

## LEGOLIBRETO IV.

por karaj amikoj.

Akceptu ĝin kun kompreno

### Antaŭparolo

Tiu ĉi libreto deziras dediĉi al komencintoj de nia lingvo diversajn legaĵojn, iom amuzi, iom eduki. Ankaŭ sciigi pri ĉeĥa karaktero. Ĝi enhavas originalajn artikolojn de amikoj – Pavla Zemanová, Jaroslav Kroplupper, Pavel Brom, Jarmila Rýznarová, Jana Holcová, Vlado Sládeček kaj de mi. Mi elektis ion de niaj fratoj – slovakoj el ilia revuo kaj por pli bone kompreni ĉeĥojn mi tradukis kelkajn artikolojn el ĉeĥaj ĵurnaloj kaj gazetoj. Ankaŭ en la libreto estas pecoj el esperantaj gazetoj, ĉar neniu povas legi ĉion kaj ankaŭ en ĝi estas artikoloj de miaj eksterlandaj amikoj, kiuj sendis ilin al mi kaj posedas antaŭajn libretojn. En libreto oni informas pri libroj, kiujn mi konsideras interesajn: „Ribelo de deprivitoj“, „Ĉeĥa kuracisto en koro de Afriko“, „Malantaŭ kulisoj de vortoj“ „Tridek jarojn en la ora nordo“. Por tiuj, kiuj volas nur koncizan legaĵon, mi kolektis diraĵojn – citaĵojn, kelkajn anekdotojn. Du artikoloj - pri malsano disŝutita sklerozo kaj eŭtanazio povas eĉ lanĉi kapdoloron. Certe „Vortoj“ en la fino de la libreto estas serioza legado el verkoj de gravaj esperantistoj.

Tiel ĉiu trovos ion por si laŭ sia apetito, laŭ sia portempa humoro kaj ankaŭ laŭ sia lingvoscio.

Fakte kialo, kial mi komencis kolekti artikolojn kaj parte verki, estis prepari por miaj studentoj post la kurso legaĵon sufiĉe buntan, kiun ili devus ie nefacile serĉi mem.

Kial unue tri fabeloj? Ĉar fabelojn ŝatas homoj de ĉies aĝo...

via

Jindřiška Drahotová, Ĉeĥio

## **Al kiu kantis la birdeto?**

### **Malnova bulgara rakonto**

Du vilaĝanoj iris en la urbon kaj haltis sub granda arbo por ripozi en ĝia ombro. Apenaŭ ili sidiĝis, sur la arbo ekkantis birdeto. Dum kelka tempo ili aŭskultis kun plezuro la dolĉan kanton de birdo. Fine unu el ili diris: „Vidu kaj aŭskultu, kiel bele ĝi kantas al mi.“ „Ne al vi, sed al mi ĝi kantas“ diris la alia.

Kaj ili komencis disputi, ili disputegis, kaj fine ili iris al juĝisto, por ke li prijuĝu ilian disputon. Enirinte en la juĝejon, unu el ili subdiris al la juĝisto: „Decidu, ke al mi kantis la birdeto,“ kaj metis en lian manon dudek groŝojn por lin subaĉeti. Pli poste venis la alia kaj flustris al juĝisto la samon: „Sinjoro juĝisto, aljuĝu, ke al mi la birdeto kantis,“ kaj enlasis en lian manon kvardek groŝojn.

Ambaŭ vilaĝanoj eliris kaj senpacience atendis la verdikton. Post kelka tempo la juĝisto ordonis al la servisto alvoki la vilaĝanojn internen. Li diris al la unua: „Nu, diru al mi, kial vi interdisputas!“ Kaj la vilaĝano rakontis kio okazis. La juĝisto silentis kaj ŝajnigis, ke li pripensas, kaj poste li diris: „Amikoj, la birdeto kantis al neniuj el vi, ĝi kantis al ... mi!“

Dirinte sian saĝan verdikton, li montris al ili la pordon kaj enpoŝigis sesdek groŝojn.

Kiel ofte oni disputas pri tio, al kiu la birdo kantis... !

### **St.Minkov, Sofia, Bulgario**

El „La Mondo Rakontas“ – 50 rakontoj el 5 kontinentoj  
kompilis Theodor Kilian Ĉeĥio.

## **El la libreto „La aventuroj de Ŝpar- kaj Aliaj Porketoj“**

Rik de Roover  
Flandra esperanto-Ligo, Antverpeno 1982.  
Facila pitoreska legaĵo por infanoj.

### **Rozinjo, la ŝparporketo**

Kiu loĝas en numero 18? Ĉu ni rigardu? Sub la sonorilo ja troviĝas la nomo. Pun. Ĝi estas mallonga nomo. Facile memorebla.

Nu jes, ĉi tie loĝas familio Pun. Paĉjo Pun kaj panjo Pun, kaj ilia fileto Roberto. Sed Roberto, tio sonas tiel grave. Tial ili prefere nomas lin Roĉjo. Ĉu ni faros same? Nu, jen ĉio.

Miaŭ-maŭ-aŭ!

Kiu estas tie? Ho jes, mi jam rekonas lin. Ankaŭ tiu loĝas ĉi tie. Estas Princo, la virkato.

Rigardu kiel karbe nigra li estas.

Miaŭ-maŭ-aŭ!

Princo kuras laŭlonge de la flankmuro de la domo. Ni sekvu lin!

Jen, li alvenas al la heĝo. Li rampas sub ĝin. Tion ni ne kapablas fari. Ni estas multe pli grandaj. Sed, kiam ni igas nin fabele malgrandaj tiam ni sukcesos. Ĉu vi vidas? Kion ni faros nun?

Ĉi tie estas pordeto. Neniam ni vidis pordeton tiel malgrandan. Strange, la ĉarniroj staras supre.

Ne strange, pensas Princo. Per sia kapo li puŝas kontraŭ ĝi. Flip, ĝi baskule malfermiĝas, Flap, ĝi baskule fermiĝas. Ĉiam malfermita kaj ĉiam fermita. Pluvo kaj vento ne kapablas trapasi la pordeton. Nek hundoj, nek ŝtelistoj. Ili estas tro grandaj. Sed por Princo estas nur infanludaĵo, tia flip-flap-pordeto. Jam delonge li estas endome. Kaj ni? Ĉu ni sukcesus?

Jes, ĉar ni igis nin fabele malgrandaj, tio estas tutsimple. Venu, ni kuniru kun Princo.

Tra la kuirejo. De la kuirejo en la koridoron. Ĉiuj pordoj estas malfermitaj. Panjo Pun neniam fermas la pordojn. Foje paĉjo Pun iom koleras pro tio. Sed ne ni. Kaj certe ne Princo. Ĉu ni sekvu lin?

Nun, ni staras antaŭ la ŝtuparo. Kiom altaj estas la ŝtupoj nun, ĉar ni iĝis tiom malgrandaj. Sed tamen ni atingos la supron. La gimnastikkurso de profesoro Fiks igis nin rapidaj kaj flekseblaj.

Sur la plataĵo, vide al vide de la ŝtuparo, estas pordo. Ankaŭ tiu estas malfermita. Princo ŝtele eniras. Tion paĉjo Pun ne permesas al li. Sed tamen tion la virkato faras. Venu, ni sekvu lin.

Tiel ni venas en beletan ĉambreton. Ĉe la muro de la ĉambreto pendas kolorriĉa gravuraĵo. Ĝi montras boaton. Nu vidu! Tiun boaton ni jam konas. Ĝi estas la Baleno. Ĝia nomo troviĝas sur ĝi. Sub la gravuraĵo staras libroŝranketo. Antaŭ la ŝranketo staras lito. En tiu lito kuŝas knabo. Knabo dekjara. Li dormas. Lia buklohararo montriĝas de sub la kovriloj. Kiu estas li? Roĉjo Pun kompreneble. Kiu alia li povus esti? Nun Princo ekkuŝas sur la liton. Kiom paĉjo Pun koleras se li tion vidus!

Ĉu ni vidis ĉion? Tute ne. Tiun grandan tolaĵoŝrankon ĉe la alia flanko de la fenestro. La librojn en la libroŝranketo. Sendube estas la libroj, kiujn Roĉjo ŝatas legi. Kiaj malfacilaj nomoj troviĝas sur la dorsoj de ĉi tiuj libroj! Apenaŭ legeblaj. Sed, tio staras sur preskaŭ ĉiuj librodorsoj: vojaĝo aŭ vojaĝoj. Kaj tie la gravuraĵo kun la Baleno kontraŭ la muro. Certe ne hazardo. Mi kredas ke Roĉjo multe pensas pri vojaĝoj.

Ĉu nun ni vidis ĉion?

Neniel! Rigardu! Kio staras tie sur la ŝranketo? Tiu roza aĵo. Sed, tio estas porketo. Ŝtona porketo. Kial ĝi estas tie? Nu, bone atentu kaj tiam vi mem divenos. Ĉu vi vidas? En ĝia dorso estas granda fendo. Ne, ne! Vi ne krii: ve! ve! tio ne kaŭzas doloron. Devas esti tiel. Ĉar tiu ĉi porketo estas ŝparporketo. Tra tiu fendo Roĉjo glitigas ĉiujn monerojn, kiujn li ricevas. Li ja ŝparadas.

Por kio li ŝparadas? Ne estas malfacile diveni. Tiuj libroj kaj tiu gravuraĵo de la Baleno ĝin al vi malkaŝas. Li ŝparas por vojaĝo. Por vojaĝeto per la Baleno.

Kaj tial Rozinjo staras nun jam sep jarojn sur tiu libroŝranko. Kun sia muzeleto al la granda fenestro. Kun sia vosteto al la tolaĵoŝranko.

## **Najado Atendulino**

Fabela nomo de la najado estas en ĉeĥa lingvo „Víla Čekanka“  
- feino, kiu atendas  
Latine: ciĥorio intybus,

Certe vi konas belegajn blujajn floretojn, kiuj floras somere sur herbejoj kaj ĉe vojoj kaj velkas nur en alvenanta aŭtuno. Sed vi eble ne scias, kiel ili aperis.

Tio okazis iam ege antaŭlonge, kiam sur herbejoj vivis eta najado kun belegaj blujaj okuloj. Ŝi vadetis en matena roso, aŭskultis birdajn kantojn kaj dancis en herbo plena de bonodoraj floroj. Ŝi ĝuis pri blua ĉielo kaj pri la suneto, kiu de tempo al tempo ekridetis je ŝi. Sed ŝi ŝatis ankaŭ pluvon, ŝi kolektadis etajn gutojn kaj pendigadis ilin sur trunketojn de herbo kiel koralbidojn. Herbejo estis ŝia mondo, alian ŝi ne konis.

Ian tagon, komence de somero, sur vojo ĉe la herbejo aperis malgranda knabeto. Li estis lerneĵano por kiu komencis ferioj, kaj li iris laŭ tiu ĉi vojo hejmen. Li tre miris, kiam antaŭ li aperis bluokula knabineto, ridetema najado. Ŝi al li rakontis, ke ŝi estas tutan tagon sola kaj demandis, ĉu li povus kaj ŝatus kun ŝi iom ludi. Li konsentis tre volonte. Ili gaje petoladis sur herbejo, kaŝludis kaj la knabo al najado instruis belan infanan poemeton kaj kanteton. Ili komune sentis sin tre gaje, bone reciproke interkomprenis, sed la knabeto devis iri hejmen, por ke liaj gepatroj pri li ne timu. Al la bluokula herbeja najado li promesis, ke venontan tagon li denove alvenos por ludi kun ŝi.

Kiam la eta lerneĵano matene vekigis, li ekaŭdis gajan muzikon kaj infanajn ridojn kaj kriojn. En lian vilaĝon alvenis kermeso kun ĉiuj allogaĵoj. Li serĉis siajn kamaradojn kaj ili tutan tagon ĝuis diversajn plezuraĵojn kiel ekzemple diversajn karuselojn, boatpendolojn kaj pafejojn. Pro tio li entute forgesis, kion li al la herbeja najado promesis.

La malgranda najado longe atendis sian amikon. Kiam la suneto pli kaj pli kliniĝis al proksima altaĵo, ŝi estis pli kaj pli malgaja. Ŝi ekpensis, ke ŝia lerneĵaneto jam ne plu alvenos. Kaj kiam sur firmanenton eksaltis la unuaj steletoj, ŝi ekploris. Ŝi ploris tiel longe, ĝis kiam ŝiaj blujaj okuloj degelis, ĝis kiam ŝi mem tuta en tiuj ĉi larmoj solviĝis. Kaj tie, kien ŝiaj larmetoj sorbiĝis en sekan grundon, tie elkreskis belegaj blujaj floretoj, blujaj atendulinoj – ciĥorioj.

Venontan tagon la knabo vekigis kaj kiam li tra fenestro ekvidis bluan firmanenton, li rememoris la blujajn okulojn de la eta knabineto, kiun li renkontis

sur herbejo. Li ekkuris tien, kie li antaŭhierau renkontis ŝin, sed serĉante ŝin kiom ajn, la herbejan najadon li ne trovis. Nur ĉie ĉirkaŭ floris belaj bluaj floroj, kiuj ŝiajn okulojn rememorigadis.

Kaj ili floras ĝis nun. Ili ekfloras komence de somero, kiam infanoj antaŭ ferioj revenadas el lernejoj, ili floras la tutan someron kaj ankoraŭ en septembro, kiam infanoj denove revenadas en lernejojn. La malgranda herbeja najado Atendulino revas plu sian sonĝon kaj ŝi kredas, ke iam inter infanoj ŝi denove ekvidos sian lernejaneton. Tiam poste ŝiaj bluaj okuloj kiel bluaj floretoj larĝe malfermiĝos kaj ridetos.

Laŭ la fabelo de Blanka Štráchalová,  
esperantigis Jana Holcová, Mělník,  
januaro 2002.

### **Pri malgranda neĝa feino**

Ekestis vintro. Petolema vento sur blua ĉielo disblovadis neĝerojn. Ili faladis malrapide teren kaj ŝajnis kvazaŭ ĉi tie dancadis malgrandaj subtilaj feinoj. Iuj eksidis en branĉaron de arboj, iuj sidiĝis sur arbustojn, aliaj sidis sur herbejo. Unu el tiuj ĉi neĝaj feinoj alteniĝis sur kardeton. Ŝi scivole observis ĉion, ĉar ŝi estis ankoraŭ tre nesperta, ŝi ekzemple nun unuanfojon ekvidis bele neĝkovritajn montetojn kaj herbejojn, kiuj por momento ekbrilis en pala suneto. „*Vi varmigas min*“, flustris malgranda neĝa feino kaj ŝi alpremis sin al sekiginta folio de la kardeto. „*Sed longe mi jam ĉi tie ne restos*“, respondis la suneto, „*alvenos regno de vintro, al vi tio certe plaĉos*“ kaj tuj la suneto malaperis malantaŭ malhela nubo. De tiu tempo la malgranda neĝa feino restadis sur la kardeto kaj ŝi scivoleme observis ĉion, kio estis de ĉi tie videbla. Kaj tion ne estis malmulte! Tuj matene vekis ŝin grandaj nigraj birdoj – frugilegoj - per grakado, sur kampoj petolis leporoj kaj en branĉaro de arboj de tempo al tempo ŝi ekrimarkis sciurojn. Kaj eĉ pli – kiam alkuris infanoj kun sledoj kaj sketiloj kaj ili komencis sur glacia fiŝlageto kaj sur deklivoj prezenti siajn gajajn ludojn! Tiam la malgranda neĝa feino sentis sin kiel en sonĝo. Por ke ŝi estu pli proksime al infanoj, ŝi flugetis al ili. Al ŝi ŝajnis, ke ŝi petolas kaj ĝuas kun ili. Ŝi rigardis iliajn neĝbulajn batalojn kaj konstruon de neĝuloj kaj kun ili ŝi ĝojatendis alvenon de la sankta Nikolao. Ŝi aŭskultis rakontadon pri Kristnasko, pri donacetoj, kiujn infanoj ŝatus havi sub kristnaska arbeto. Kaj kiam dum unu vere tre belega nokto ŝi ekvidis malantaŭ fenestro de unu domo grandan brilan kristnaskan arbon, ŝi sentis sin kiel en ĉielo, de kie ŝi alflugis. Tie ja ĉiam brilas miloj da steletoj.

La malgranda neĝa feino estis feliĉa kaj ŝi pensis, ke tio restos por ĉiam. Ŝi ne sciis multe pri la mondo. Surprizis ŝin, ke noktoj sur la kardeto estis ĉiam pli mallongaj kaj tage ĉiam estis pli kaj pli da lumo. Tiel tio progresis iun tempon, ĝis en unu tago sur la ĉielo subite montriĝis la suneto. „*Vi multe varmigas*

*min*“, diris per mallaŭta voĉo la malgranda neĝa feino, kaj ŝi premiĝis al la seka folio de la kardeto. „*Kaj mi varmigos vin ĉiam pli*“, respondis la suneto, „*ĉar regado de vintro finis. Ĉu vi aŭdas alaŭdeton? Revenas al ni printempo. Post iom da tempo vi devas reveni ĉielen.*“ La malgranda neĝa feino nur ĝemetis, ŝi iomete elverŝis kelkajn larmetojn, kaj poste ŝi degelis. Kaj tie, kien falis ŝiaj larmetoj, ekfloris ankoraŭ sur la neĝo la unuaj blankaj floretoj, galantoj. Ili certigas nin, ke ni ne estu malĝojaj, ĉar la malgranda neĝa feino ne malaperis por ĉiam. Kun la regno de vintro post unu jaro ŝi denove revenos al ni.

Rakonto de Blanka Štráchalová, Mělník,  
esperantigis Jana Holcová, Mělník,  
novembro 1999.

### **Rakonteto pri ludo kun farboj**

Iun tagon Daĉjo komencis pentri bildeton por panjo okaze de ŝia nomtago. Li pentris tre diligente, ja kun akvofarboj li jam estis longe bona kamarado. Li sperte metadis unu farbon apud la alia, sed neatendite okazis, ke du farboj intermiksiĝis.

Tion mi fuŝlaboris - ekpensis Daĉjo - kaj sentis sin tre kulpa, liaj okuloj kvazaŭ demandis: Kion diros al tio la panjo?

La panjo kliniĝis super la bildeto kaj kun rideto diris: „Ni rigardu, farboj ŝatas kun ni ludi. Eble vi tion ankoraŭ ne scias, sed farboj iam kun si ludas kaj dum tiuj ĉi ludoj ili miksiĝas tiel, ke el ili estiĝas aliaj belaj farboj. Ĉu vi ne kredas tion? Ni iru, ni povas tion komune provi.“

Poste ili kune miksis farbojn kaj Daĉjo vidis miraklojn. Kiam oni miksas iomete de flava „suneta“ farbo kun kelkaj gutoj de blua, oni ricevas verdan koloron por bela gazono. Kaj kiam oni en ruĝan farbon aldonas flavan farbon, oni povas pentri oranĝan belan globan oranĝon. Kaj farbon por violo oni preparas tiel, ke oni miksas ruĝan kaj bluan farbojn kune. Tio estas, hometoj, vera sorĉado!

Daĉjo enmetis farbojn sur malsekan paperon kaj li ĝojis, kiam la farboj ŝanĝiĝis al farbo alia. Kiam li jam sufiĉe ludis, li revenis finpentri sian bildeton. Tiu ĉi intertempe sekiĝis kaj la loko, kie du farboj renkontiĝis kaj kunmiksiĝis, nun aspektis tre bele

Kiam Daĉjo la bildeton transdonis al sia panjo, ŝi certigis lin, ke tiu ĉi bildeto estas la plej bela donaceto, kiun ŝi povus okaze de ŝia nomtago ricevi. Li ja pentris ĝin entute mem kaj kun granda amo.

Tiun ĉi rakonteton verkis Blanka Štráchalová el Mělník, avino de Daĉjo (ŝia hobia estas pentrado), kaj esperantigis ĝin Jana Holcová el Mělník, la dua avino

### **Diraĵoj de mia avinjo**

Mia avinjo Anna Khýnová (1895 – 1980) estis kamparanino en malgranda vilaĝo en parto de Ĉeĥio – Sudety - kiu dum la dua milito apartenis al Germanio, do ŝi parolis la ĉeĥan kaj germanan same bone. Oni vokis ŝin al nasko de beboj por ŝiaj akuŝaj spertoj. Ŝi amatore teatraĵis. El ĉiu situacio ŝi kapablis elturniĝi. Ŝi edukis 7 infanojn kaj pli multe da genepojn.

Homo ne pliriĉiĝas per alta enspezo, sed per malalta elspezo.

Kiu al iu preparas truon, mem falas en ĝin.

Faru al diablo bonon, li salajros vin per infero.

Junaj kuŝantoj, maljunaj almozpetantoj.

Kiom da lingvoj vi konas, tiom oble vi estas homo.

Diablo ĉiam fekas sur pligrandan amason.

Homo klopodu kaj dio benos, alie li fajfos pri vi – sed ŝi uzadis pli sukan vorton.

Dio havas aliajn zorgojn, ne ĝenu lin.

Ne desegnu diablon sur muron.

Neniu havas rajtigilon pri racio.

Se vi volas havi belan vesperon, kuiru teon el timianeto.

Nenion vi kunprenos en tombon.

Kiu timas, fekas en koridoro.

## **Jara da Cimerman – grandulo de ĉeĥa nacio**

Simile kiel en aliaj landoj en Eŭropo, eble ankaŭ en mondo, laŭ modo, oni ĉe ni aranĝis enketon pri la plej „granda“ persono de nia nacio en la jaro 2005. Oni telefonis per poŝtelefonoj, ke povu profiti niaj freŝbone bakitaj kapitalistoj el amuzo de popolo, sed homoj povis voĉdoni ankaŭ alimaniere, ekzemple perpoŝte.

Kaj kio okazis? Homoj proponadis krom veraj personoj - personigajn fantomojn: desegnitajn knabeton, kiu dum jardekoj deziradas en ŝtata televido „Bonan vesperon“ antaŭ vere naciaj, teneraj fabeloj por trankvila nokto, aŭ figuretojn el tiuj belaj fabeloj. Krome inter granduloj de ĉeĥa nacio aperis dukino Libuše, mita filino de mita prapatro Ĉeĥ, aŭ brava soldato Ŝvejk – literatura figuro kreita de Jaroslav Hašek. Sed plej multe da voĉoj ricevis fikcia geniulo Jára da Cimerman.

Naskiĝis problemoj, ĉar Jára da Cimerman gajnadis multe kaj pli kaj pli da voĉoj. Estis necese fari liston de tiuj fikciuloj kaj elimini ilin de veraj homoj, ĉar ne eblus, se li venku super veraj merituloj.

Zdenek Svěrák kaj Ladislav Smoljak, kreintoj de la famulo Cimerman, estas talentaj, ŝatataj, spritaj, saĝaj, diligentaj homoj, kiuj per siaj filmoj akiris prestiĝajn estinigojn – eĉ usonan „Oskaron“. Ilia „Teatro de Jara Cimerman“ en Prago, kie virinajn rolojn ludas viroj, alportas nekredeblan inteligentan nun jam nacian humuron. Monumentojn kaj memortabulojn nun oni povas trovi diverse en nia lando. La lastan spuron de lia plando oni trovis nun eĉ Usono. Lian piedsignon vojaĝis omaĝi ĉeĥaj entuziasmoj en Usonon kaj fiksis tie memortabulon ĉi jare (2006).

La „Enketo pri „GRANDA ĈEĤO“ finiĝis. Venkis ĉeĥa reĝo kaj imperiestro Roma kaj de nacioj germanaj – Karolo la Kvara – filo de lasta reĝino el ĉeĥa Premisla gento – Eliška Přemyslovna.

La dua estis elektita la unua prezidento de Ĉeĥoslovakio – Tomáš G. Masaryk kaj la tria: Václav Havel, vivanta eksprezidento de Ĉeĥio.

Jindřiška Drahotová

(En Legolibreto II vi povas legi pri renkonto de Jára Cimerman kun Ludoviko Zamenhof de Karel Votoček.)



## **Kelkaj anekdotoj**

En iu hotelo en alia kontinento demandas kelnero duopon – viro pliaĝa kaj blonda junulino – kiu ĵus abunde vespermanĝis: „Ĉu mi povas ankoraŭ iel servi al vi?“ prenante vakan botelon de ĉampano.

„Dankon“, respondas viro, „nenion plu.“

„Kaj por via juna edzino?“ daŭrigas kelnero.

„Jes, bone vi rememoris al mi edzinon. Portu belan poŝtkarton kaj poŝtmarkon.“

La kelnero plu parolas: „Se en via ĉambro nokte envenos ratoj, restu trankvilaj. Post momento venos kobro kaj englutos ilin.“

Matene ĉe disiro demandas la viro sian blondulinon: „Ĉu mi povas telefoni al vi en oficejon?“

„Jes, vi povas, sed se alparolos vin mia ĉefulino, tuj nuligu la vokon.“

„Kiel mi ekscios ke parolas ĉefulino?“

„Ŝi estas ruĝharulino kaj portas okulvirojn.“

Blondulino venante tra parko oficejon vidas leporon. Ŝi volas pliproksimiĝi al ĝi. Ŝi kaŝas sin inter arbustoj kaj faras sonojn kiel karoto.

La leporo vere scivole venas. Ĝi estas saĝa leporo kaj post ĝentila saluto edukas blondulinon: „Viroj bezonas edzinojn, ĉar ekzistas aferoj, por kiuj ili ne povas kulpigi registaron! Estu singarda!“

Sed blondulino neglektas ĝin kaj iras laŭ rivero al la oficejo. Sur kontraŭa bordo vidas alian blondulinon kaj vokas ŝin, ĉar volas babili kun ŝi. Do, vokas al ŝi: „Kiel mi akiros la kontraŭan bordon?“

La dua respondas: „Kial, vi jam estas sur la kontraŭa.“

## La mondo elektis „superanekdoton“.

### Ivo Bártík

Kiu anekdoto estas la plej bona? Tian demandon povis starigi nur britaj ĝentlemanoj. Pro tio ili fondis „Laboratorion de rido“ – LaughLab - LL kaj lanĉis tutmondan konkurson pro la plej ridinda anekdoto. Preter tio ili eksciis ankaŭ vicon de aliaj aferoj: ekzemple – germanoj ridas ĉiam kaj al ĉio, kontraŭ kanadanoj, kiuj estas rigidaj al anekdotoj.

Dum 14 monatojn ricevis LaughLab pli ol 40 000 anekdotojn kaj ĉirkaŭ 2 milionojn da opinioj pri ili. Ĉio okazis per interreto. Post obstina baraktado kun malgrandeta plimulto venkis jena anekdoto: „Du ĉasistoj promenas en arbaro. Subite unu falas teren kaj restas senmova. La dua poŝtelefono vokas sanservon: „Mia amiko estas morta. Kion mi faru?“ Deĵorulino respondas: „Nur trankvile, unue vi kontrolu, ĉu via amiko vere estas morta.“ Post ia minuto oni aŭdas en telefono „pafo de certeco“. La ĉasisto daŭrigas vokadon: „O.K. nun mi estas certa. Kion mi faru plu?“

Eble tiu ŝerco ne tre plaĉas al vi, ĉar eŭropanoj havas alian guston, sed amerikanoj kaj kanadanoj plej parte voĉdonis por ĝi. Psikiatro Gurpal Gosall, kiu sendis tiun ĉi anekdoton, klarigas: „La anekdoto plaĉas, ĉar montras, ke ĉiam oni trovas iun, kiu estas pli stulta.“

Psikologo Richard Wiseman, estro de LaughLab pri tio jesas: „Anekdotojn ni ŝatas pro multaj kialoj, la ĉefa estas, ke anekdoto donas al ni senton de supereco super iliaj roluloj.“

Tio ne estas io nova, jam Gustave Flaubert skribis: „Rido estas frukto de nia sento de supereco super homoj en ĝenaj kaj stultaj situacioj.“

La duan ŝercon, kiu longe estis sur unua loko, vi certe konas: „Sherlock Holmes kaj Dr. Watson tendumis, tranoktis sur herbejo. Antaŭ mateno ili vekigis kaj vidis ĉielon plenan da steloj. „Watson, kion diras al vi via rigardo?“ demandas Holmes. „Ĉu vi pensas pri astronomio, meteorologio aŭ pri teologio?“ respondas Watson. „Ne, mi opinias, ke vi estas idioto, kiam vi ne vidas, ke iu ŝtelis nian tendon!“ krias fama detektivo.“

LL listigis anekdotojn de dek landoj, kiuj partoprenis la plej nombre.

Jen kelkaj anekdotoj, kiuj ridigis plej multe da homoj en la mondo:

El Belgio: „Kial anaso havas inter fingroj naĝhaŭton? Por ke ĝi povu per ili neigi fajron. Kaj kial havas elefantoj platajn plandojn? Por ke ili povu alpaŝi kaj neigi brulantajn anasojn.“

El Germanio: „Iu soldato strange kondutas. Ĉie kolektas paperetojn, rigardas ilin kaj murmuris: Tio ne estas tio, tio ne estas tio. Finfine serĝento sendas lin al psikiatro, kiu skribas al li dokumenton pri lia nekapablo servi kiel soldato. Soldato rigardas dokumenton kaj ĝoje vokas: Tio estas tio!“

El Aŭstralio: „Venas virino al kuracisto kaj diras: Sinjoro doktoro, matene mi rigardis min en spegulo kaj mi vidis kiajn sulkojn kaj nigraĵojn sub okuloj mi havas, jen mi estas tute pala kiel kadavro kaj miaj haroj estas sekaj kaj rompiĝitaj. Kio mankas al mi? Doktoro heziteme rigardas la virinon kaj poste malrapide diras: Nu, la bona vido ne mankas al vi...”

El Kanado: „Kiam NASA sendis unuan fojon astronautojn en kosmoson, oni konstatis, ke el globkrajonoj pro senpezeco ne eliras koloro kaj oni ne povas skribi. Pro tio usonaj esploristoj laboris dum dek jaroj je 12 miliadoj por konstrui globkrajonon por senpezeco. Kiam ili jam estis antaŭ celo, eksciis pri solvo de rusoj: rusoj skribas en kosmoso per antikvaj krajonoj.”

El Usono: Viro ludas golfon. Preter veturas funebra veturilo. La viro ĉesas ludi, demetas ĉapon kaj silente staras dum minuto. Lia partnero diras: Tio estas io la plej kortuŝa, kion mi iam vidis. Vi estas sentema homo. La viro respondas: Do, ŝi estis mia bona edzino dum tridek kvin jaroj.”

El Britio: „Patrino kun infano envenas aŭtobuson. La ŝoforo diras: Fi, tio estas la plej malbela infano, kiun mi iam vidis. Virino aŭdas tion kaj al sia najbarsidanto diras: La ŝoforo ofendis min! La najbarsidanto proponas: Iru al li kaj defendu vin, dume mi prizorgos vian simieton.”

El Francio: „Hundo venas en poŝtofacejon kaj petas sendi telegramon. Sur formularon ĝi skribas naŭ foje „haf“. Oficistino diras al ĝi: vi povas skribi eĉ dek foje je sama prezo. Sed la hundo ektimiĝas kaj ĝemas: Per tio oni tute ŝanĝus la sencon!!!“

El Danio: „Viro en oficejo rakontas al kolego: Hodiaŭ matene mi strange misparolis. Mi volis demandi edzinon, ĉu ŝi deziras lakton en kafon kaj mi mise diris: Vi idiota bovino, vi detruis mian tutan vivon.”

Tamen, homoj en diversaj partoj de la mondo havas ankaŭ diversan sencon por humuro. Oni devus konsideri tion, se oni volas kompreni pensmanieron de diversaj nacioj. Kio ie estas ridetinda, povas esti en alia loko morta ofendo!

En Ĉeĥio de tempo al tempo aperas konkurseto de anekdotoj, sed ne en tiu skalo, ke oni povus diri, ke oni serĉas „superanekdoton“.

Do, tiu ĉi ĉeĥa anekdoto devenas el Brunno el la jaro 2003: „En groto kunvenas Al Kajdo kun 8 similuloj de Osama ben Laden. Tárik Aziz diras: Mi havas por vi du informojn – bonan kaj malbonan. La bona: Osama travivis bombardadon kaj vi plu povas labori je lia servo kaj esti salajrataj. La malbona informo: Li perdis manon...”

**Ne estu stulta, lernu!**

**El Magazín Lidových novin paĝo 23**

24.6.2005

En nia lando vivas komunumo de vjetnamoj. La unuaj vjetnamoj venis post la dua mondmilito por studi kaj multaj restis kaj sentas sin ĉe ni hejme. Ĝenerale ili estas laboremaj, ridemaj, komercantaj.

En tutŝtata ĉeĥa literatura konkurso venkis dek-tri-jara Ta Thuy Dung alnomita ĉeĥe Zuzka. Ŝi venis en Ĉeĥion kiam ŝi estis kvinjara kun gepatroj kaj ne konis eĉ unu ĉeĥan vorton. Ĉi jare ŝi venkis en konkurso per ŝia verko „Malsameco“. La diplomo pendas en ĉambro de gepatroj, kiuj posedas malgrandan butikon.

Kaj ankoraŭ io pendas en ĉambro de Zuzka: ŝia slogano: *Lernu, lernu! Lernu por via estonteco!! Lernu, post falo leviĝu!!! Oni ne emas lerni? Ne estu stulta, lernu !!!!*

Parto el ŝia verko:

Mi malsamas de la aliaj, ĉiu tuj tion vidas. Sed rigardu tion el vidpunkto de homa sento. Ĉu mi vere estas alia? Ĉu mi vere valoras malpli ol aliaj? Ĉu mi havas malpligrandan rajton esti en estonteco „iu grava“? Eble vi nun diras, ke ne. Sed ekzistas homoj, kiuj diras: jes! Ili vidas ordinaran vjetnaminon, homon, kiu ne havas rajton esti feliĉa. Kiam mi venis en tiun ĉi landon, mi estis eta kaj celo de la moko pro mia deveno kaj malsameco de preterpasantoj kiuj ne konis min, vundadis min. Komprenu min, vi estas inter homoj, kiujn vi ne konas kaj kiuj ne konas vin, ili ofendas vin, malgraŭ vi ne faras tion al ili. Ĉiam mi malgaje pensis pri tio...

Tial mi ĉiam strebis bone lerni kaj esti en ĉiuj direktoj la plej bona.

Mia patrino diris al mi iam: „Kara Ta Thuy, kiam vi maturiĝos, ni fieros pri vi, vi estos vera persono kaj neniu primokos vin, ĉar jam nun vi estas „iu!“ . Penu, mia kara knabineto, ĉar post tiu ĉi klopoda tempo venos roza ĝardeno, kie ĉiu homo gustumos la samajn dolĉajn fruktojn.“

Tiujn ĉi vortojn mi portas profunde en mia koro. Mi promesas al vi, panjo, ke mi venkos mian batalon. Kaj kredo, mi promesojn plenumas.

Tradukis J.Drahotová.

Rinoceroj

**El Gazeto „Květy“, - serio pri bestoj – Nro 30/2006-02-04**

Rinoceroj estas fortikaj bestoj, vivantaj en tropikaj Afriko kaj Azio. Dum lasta glacialo ili vivis eĉ en meza Eŭropo kun mamutoj, kaj niaj prauloj ĉasis

ilin. En tiuj tempoj rinoceroj aspektis alie. La plej grandaj estis 5 metrojn longaj kaj 20 tunoj pezaj kaj estis dense vilaj kontraŭ frosto. Unu speco de vilaj rinoceroj travivis ĝis nun – rinocero sumatra. Nun entute vivas 5 specoj de rinoceroj: 2 en Afriko – dukorna kaj stumpa, 3 en Azio – hinda, sumatra kaj java.

Ili sukcese travivis ŝanĝojn sur nia Tero, sed kiam ili trafis homojn, antaŭ 1-2 jarcentoj, ili viciĝis en malaperantajn specojn. Iliaj dikaj haŭtoj ne rezistas pafadon... Milionoj da homoj kredas, ke iliaj kornoj havas magian forton, kiu onidire kuracas malsanojn kaj subtenas seksan apetiton, kion kompreneble moderna scienco rifuzas. Protektantoj de naturo sensukcese baraktas kun ŝtelĉasistoj, kontrabandistoj kaj koruptitaj oficistoj.

En iuj naciaj parkoj de Afriko kaj Nepalo oni amputis kornojn de narkotikigitaj bestegoj, sed ŝtelĉasistoj rabis plu, ĉar orienta medicino „laboras“ ankaŭ kun aliaj korppartoj de tiuj grandaj bestoj. Eble helpus informo, ke anstataŭ uzi multekostan pulvoron el rinoceroj, sufiĉus nur mordi proprajn ungojn, ĉar ili havas la saman enhavon de keratino.

Rinoceroj havas bonan aŭdpovon kaj flarpovon, sed ili malbone vidas, estas miopaj. Se ili estas maltrankviligitaj, kuras al direkto de kialo por kontroli pli proksime. Maksimume ili vidas sufiĉe en distancon de 30 metroj. Ili paŝas per rapideco ĝis 4 km hore, sed dum incito kuras ĝis 50 km hore.

Post elefanto estas rinocero la plej granda vivanta surtera mamulo.

Esperantigis J.Drahotová

## **Profunda dekoltaĵo kiel Claudia Cardinale!**

Halina Pawlovská, fama populara vizaĵo de Ĉeĥa televido, verkistino, scenaristino kaj porokaza artistino, naskiĝis en Prago. Ŝi gajnis premiojn „Ĉeĥa leono“, kaj dufoje premion de „Česká televize TyTy“, sed la plej famiĝis per televida serio „Bananaj fiŝetoj“. Ŝiaj konataj verkoj estas: „Malesperaj virinoj faras malesperajn aferojn“, „Dankon por ĉiu nova mateno“, „Kial mi ne pendumis min“, „Li estu freneza de amo“, „Hipopotamoj ne ploras“...

El „Magazín dnes“ 29/2006.

### **Pasio**

Mi kapjesis proponon de iu gazeto skribi ion pri pasio. Mi sentas la pasion kiel io simpatia. Mi imagas ĝin kiel momento, kiam viro simple devas virinon faligi teren kaj perfortigi ŝin, kaj tio estas belega, kiam ili reciproke amas sin. Ankaŭ mi imagas la pasion kiel *sex-apeal*. Sed la pasio min trompis! La tempo por plenumo de miaj taskoj kaj devoj mallarĝiĝis kaj mi devis konfesi, ke mi la pasion renkontis minimume.

Proksime al la pasio mi estis kiam mi estis eble sesjara. En gimnastikejo de baza lernejo Tomík Kauders blovis al mi en orelon kaj al mi stariĝis ĉiuj venontaj viletoj per eksciteco.

Eble venis la pasio, kiam mi batis tenisajn pilkojn en praga „Stromovka“ kaj mi sukcesis estiĝi la plej bona tenistino – pliaĝa lernantino – en mezĉeĥa regiono.

La pasio estis certe, kiam mi manĝegis kazeajn kuketojn kaj tutan tempon dum semajnofinoj mi pasis kun libroj, kaj tralegis dum du tagoj eble 10 librojn kaj formanĝis pli ol sesdek kuketojn.

Aĥ! La pasio estis kiel en filmo, kiam Honza (li tuj post ekzameno de matureco komencis studi universitaton) min kuŝigis sur ŝtuparo inter dua kaj tria etaĝo en nia ludomego kaj per montrofringro palpis butonon de miaj pantalonoj. Honza ankoraŭ knedis al mi brakon kaj manikon volvis ĝis ŝultro kaj liaj lipoj el miaj lipoj transmetis al mia kolo kaj poste ankoraŭ pli sube, ĝis varmega (jam en tiu tempo profunda) loko inter mamoj.

Dio mia! Mia amo la plej granda! Pavel! Post tri jaroj de furioza amorado li decidis edziĝi al knabino, kiun li konis apenaŭ unu monaton. Kaj en tiu momento, kiam mi komprenis, ke estas fino inter ni kaj ke Pavel formetis mian koron plenan de amo, ke tiu koro nun vane batos nur „platone“ kaj mia avida sango nutros miajn vejnojn senefike, kaj en tiu momento mia korpo unuan fojon dum tiuj lastminutoj kun Pavel brulis kaj poste floris sur ondoj de sopiro kaj poste kiel ŝipo dum tempesto ŝancelis kaj mia animo ŝvebis super Pavel, super lito, super tero, super respubliko kaj super terglobo kaj mi ne estis en aero kaj sur ĉielo, sed mi mem estis ĉielo, kosmo, universo kaj milionoj da galaksioj kaj senfineco kaj nur dio (diru ke ekzistas) scias kio mi estis ankoraŭ...

Mia patro estis pasia kolektanto de fungoj. Arbaren ni iradis kune. Tial mi bone identigas boletojn, muŝfungojn, kantarelojn, bovboletojn... Tial mi ankaŭ scipovas prepari manĝojn el ili.

La funebrofesto estis hieraŭ. Freŝa amatino de Pavel havis malhelgrizan kostumon kaj mi vestis silkan robon kun granda profunda dekoltaĵo. La similan portis Cladia Cardinale. Pri ŝi Pavel ĉiam diradis, ke ŝi estas certe tre pasia virino.

El „Magazín dnes“ 29/2006.  
Elĉeĥiĝis J.Drahotová

## Rapida divorco

Vlado Sládeček, Ĉeĥio

Mi devas klarigi, ke tio okazis en la jaro 1975, kiam en Ĉeĥoslovakio regis komunisma reĝimo kaj ĝi kun siaj absurdaj manieroj influis profunde ĉies vivon.

Divorco estas ambaŭflanke malagrabra. En nia familio ni ne vivis harmonie. Pro tio mia edzino proponis eksedziĝon. Mi konsentis, sed bonan impreson mi ne havis. Mi timis de juĝada proceso, kiu certe daŭros tro longe. Se vere devas nia disiro okazi, ĝi estu rapida. Sed kiel tion realigi? Havante du infanojn, la tribunalo ne tre rapide decidus, eĉ se ni interkonsentus pri ilia edukado.

Tiutempe mia ateliero troviĝis apud jura fakultato kaj en proksima restoracio mi de tempo al tempo renkontadis kun amikoj, spertaj advokatoj. Babilante ĉe vino, mi plendis pri miaj problemoj. Ili saĝe kapskuis kaj diris: „Kara knabo, la proceso daŭros vere longe, tamen ekzistas unu ebleco, sed ĝi postulas necesan arogantecon.“ Mi akceptis ilian konsilon kaj jesis.

En destinita tago ni envenis juĝejon. La nubmiena „kamaradino“ juĝistino post necesaj formalajtoj invitis advokatinon de mia edzino por paroli kaj ŝi komencis: „La kontraŭulo ne havas regulan mongajnon, li fumas, tiamaniere li malboninfluas infanojn...“

Ĝis nun mi ne sciis, kiom da malvirtoj mi havas. Malkviete mi sidis, kolektante kuraĝon. Mia momento alvenis, kiam la juĝistino alvokis min, ke mi esprimu mian opinion. Mi ekstaris kaj diris frazon, kiu ŝokis ĉiujn: „Mi konsentas pri divorco, ĉar mi rifuzas plue vivi en komuna hejmo kun persono, kiu jam ses jarojn malhelpas al mi aliĝi en komunistan partion.“

Por momento ekregis profunda silento. Poste eksaltis la advokatino de mia edzino kaj ekkvikis: „Dio mia, tion vi ja ne diris al mi!“

Nun ĉi tiu historieto ŝajnas nekredbla, sed nia edzeco estis dum dek minutoj divorcita.

## Mi gastigis turkon

Jarmila Rýznarová, Ĉeĥio.

Venis al mi letero bele afrankita per turkaj poŝtmarkoj. Dum E-kunveno mi tralegis enhavon de la leteto kaj volis scii opinion de aliaj geklubanoj, ĉu akcepti turkan esperantiston, kiu deziris en nia urbo tranokti unu tagon dum sia vojaĝo tra dek sep landoj. Preskaŭ ĥore mi aŭdis: „Ho, jes, akceptu lin kaj venigu lin en nian klubon. Ni ankoraŭ neniam parolis kun turko, ni konas turkojn nur el orientaj filmoj, ni demandos lin, ĉu ĉe ili ankoraŭ ekzistas haremoj.“

Do mi respondis jese. Venis destinita tempo kaj mi atendis kvar horojn en halo de nia stacidomo, ĉar en tiu tempo estis malfruiĝitaj preskaŭ ĉiuj rapidtrajnoj. Mi atendis kun granda mansako, sur kiu mi havis grandan verdan esperantan stelon. Neniu venis, mi kaj ankaŭ klubanoj atendis vane.

Post dek tagoj mi estis preparita vojaĝi kaj gvidi mian E-grupon de infanoj al Nikola renkontiĝo al urbo Jablonec en norda Bohemio, kie miaj 11 gelernantoj estis anoncitaj prezenti teatraĵeton kaj dum du tagoj ni planis ankaŭ ekskursi.

Du horoj antaŭ nia forveturo iu eksonoris. Antaŭ la domo staris nekonata sinjoro kaj diris: „Mi estas E.J. el Turkio. Mi ne havis eblon veni antaŭ dek tagoj, mi devis reveni de landlimo.“

„Ho, mi bonvenigas vin, sed – dio mia – kion mi nun faros kun vi? Mi devas forveturi! Ĉu lasi vin ĉi tie? Ne eblas. Vi veturu kun ni! Antaŭmendi tranokton por vi jam ne eblas, do mi kunprenos blovmatracon kaj dormosakon kaj vi dormos sur la planko de nia tranokteĵ-ĉambro.“

E-renkontiĝo okazis en ĉarma, agrabla medio. Nia turko unuan fojon vidis „sanktan Nikolaon kun diabloj kaj anĝeloj“, kiuj alportis grandan korbegon da donacetoj – ankaŭ li ricevis kelkajn. Nia infana prezentado bone sukcesis kaj nia turka gasto estis ravita – tiel multaj esperantistoj volis kun li konatiĝi.

Nokte en negranda kvarlita ĉambro nia laca turko baldaŭ ekdormis sur la blovmatraco kaj komencis vere laŭte ronki. Kion fari? Ni ceteraj ankaŭ volis dormi. Mi tuŝis lin por turniĝi kaj ne ronki. Senvorte li tion faris.

Matene dum promeno tra la urbo li demandis min per kortuŝa voĉo: „Kion vi nokte deziris de mi?“



## Virinaj meditadoj

Kiel oni povas kompreni virojn?

1. Afablaj viroj estas malbelaj.
2. Belaj viroj ne estas afablaj.
3. Belaj afablaj viroj estas gejoj.
4. Belaj afablaj viroj negejoj estas edziĝitaj.
5. Viroj, kiuj ne estas tro belaj, sed estas afablaj, estas senmonaj.
6. Viroj, kiuj ne estas tro belaj, sed estas afablaj kaj havas monon, pensas, ke ni avidas ilian monon.
7. Belaj viroj senmonaj avidas nian monon.
8. Belaj viroj, kiuj ne estas tro afablaj kaj estas negejoj, pensas, ke ni ne estas tro belaj.
9. Viroj, kiuj pensas, ke ni estas belaj kaj ili estas negejoj kaj estas iom afablaj kaj havas monon, estas timuloj.
10. Viroj, kiuj estas iom belaj kaj iom afablaj kaj havas ian monon kaj danke al dio ne estas gejoj, estas sinĝenaj kaj **neniam iniciatas kontakton.**

Viroj, kiuj neniam iniciatas kontakton, tuj perdas intereson, kiam ni iniciatas.

## KIU POVAS DIABLE KOMPRENI VIROJN ??

Viroj estas kiel vino. Ili similas vinberojn kaj ni devas ilin presi kaj teni flanke, ke ili maturiĝu kaj povu esti por utilo post vespermaĝo.

Transdonu la konsilojn al alia saĝa virino, kiu deziras ridi kaj al viroj, kiuj estas kapablaj primajstri la aferon.

Anonimo.

## El la libro „Zákulisí slov podruhé“ (Malantaŭ kulisoj de vortoj duan fojon)

Michal Novotný

### Arkta – ĉeĥe „arktický“

Malantaŭ kulisoj de tiu vorto ni trovos ursojn. Vortoj arkta, Arktio, Arktiko, Antarktiko... fariĝis el greka vorto *arktos* – do, urso. Kiam antikvaj grekoj rigardis firmamenton norde, ili vidis ursojn, nu, stelarojn de Granda Ursino kaj Malgranda Urso. La nordaj landoj estis laŭ ili garditaj per ursoj *arktos* – do arktaĵoj, koncize Arktiko. Tero ĉirkaŭ la suda poluso ricevis logike nomon Antarktiko.

Se vi ne konas la stelarojn de Granda Ursino kaj Malgranda Urso, sciu, ke temas pri konataj Granda kaj Malgranda Ĉaroj. Sed ni ne eraros, se ni diros ĉaroj anstataŭ ursoj, ĉar eĉ aliaj nacioj nomis tiujn ĉi stelarojn ĉaroj. Ekzemple ankaŭ indianoj en Norda Ameriko kaj araboj. En mezepoka Eŭropo oni nomis tiujn stelarojn „Ĉareto de Karolo“, angloj nomas ĝin „Plugiloj“ ĝis nun, francoj vidas norde paton. Antikvaj egiptanoj desegnis la nordan parton de la ĉielo kiel procesio vice - virbovo, alta viro (eble dio) kaj hipopotamo surdorse kun krokodilo. Tute alie opiniis ĉinoj. Ili vidis ĉielan oficiston sur nubo kiun akompanas petantoj petante lian absolvon sur la vojo ĉirkaŭ la norda poluso. En la stelaro Malgranda Ĉaro vidis ĉinoj pladon por pano kaj ankaŭ imperiestran ĉaron, egiptanoj hipopotamon, araboj grupon de homoj plorantaj ĉe la tombo kaj antikvaj kazaĥoj gregon da ĉevaloj.

Ne nur grekoj imagis al si tiun ĉi stelarojn kiel ursino kun ido, sed ankaŭ sudamerikaj indianoj kaj malnovtempaj slavoj. Kion indianaj kaj slavaj legendoj rakontas pri tio kiel ursoj venis al la ĉielo, ni bedaŭrinde ne scias. Restis nur grekaj legendoj. Laŭ iu legendo malpli konata, vivis tiuj du ursoj sur insulo Kreta kaj protektis la plej ĉefan dion Zeŭson en lia beba aĝo kontraŭ lia patro Krono, kiu volis mortigi lin. Zeŭso, kiam fariĝis dio, premiis ursojn kaj instalas ilin sur ĉielon, ĉar ili savis lin.

Pli konata legendo rakontas, ke Zeŭso enamiĝis al Kallisto – filino de lykosura reĝo el akompano de diino Artemis. Zeŭso prenis aspekton de Artemis, ke li povu proksimiĝi al Kallisto. Ĉio sukcesis kaj afero ne restis sen sekvaĵo. Kiam vidis Artemis gravedan Kalliston, ŝi ekkoleris kaj pelis ŝin for. Kallisto poste en montaro naskis filon kaj nomis lin Arkas. Pri tio eksciis ĵaluza edzino de Zeŭso - Hera kaj punis Kalliston per ŝanĝo al ursino. Arkas maturiĝis, fariĝis ĉasisto kaj – kiel okazas en rakontoj – renkontis sian patrino – ursino kaj intencis ŝin mortigi. Tion observis ĉioscia Zeŭso kaj savis Kalliston per ŝanĝo de Arkas al urso. Zeŭso ilin poste ambaŭ transportis sur la ĉielon. Ankaŭ tio ne plaĉis al Hera, sed ŝi estis senpova, ĉar la grekaj dioj ne povis nuligi farojn de siaj kolegoj. Ŝi almenaŭ prizorgis, ke la ursoj sur la ĉielo devas senĉese movi, ne ripozi. Ili neniam malaperas, movas daŭre ĉirkaŭ norda poluso. Astronomoj diras: tiuj stelaroj estas „ĉirkaŭpolusaj“.

Greka vorto *arktos* (urso) havas antikvan indoeŭropan radikon *-rksos* aŭ *-rktos*. El ĝi devenas hindaj *rkša* kaj latina *ursus*. Povas esti, ke el la sama hinda radiko devenas ankaŭ slava kaj ĝermana nomo por urso, kiuj jam estas hodiaŭ malmemorataj. Devige malmemorataj! Ĉar slavoj kaj ĝermanoj timis urson kaj ĝian nomon ne diradis, ke ĝi ne venu. Niaj prauloj uzadis elpensitan nomon: *medvěd* – manĝanto de mielo kaj ĝermanoj *bär* – manĝanto de beroj.

### **Bulvardo – ĉeĥe „bulvár“**

Tiu ĉi vorto havas en la ĉeĥa lingvo du signifojn. Unue tio estas larĝa urbega strato, kutime kun aleo de arboj, due tio estas difina speco de ĵurnalo – ne tro serioza, iam eĉ malserioza. Tia ĵurnalo ne informas, ĝi aperas nur pro profito kaj tiun akiras per amuzo el klaĉoj kaj mensogoj pri famaj homoj, sensacioj el historio, eventuale per konsiloj kiel dum kelkaj minutoj perdi 2 kg da korpa pezo.

Nun ni malkaŝos, ĉu tiuj du „bulvár“ iel rilatas. La rilato estas tre proksima – la dua vorto devenas de la unua vorto. Ĉe komenco estis ĉirkaŭ urboj mezepokaj muregoj, kiuj estiĝis superflujaj kaj oni disfalis ilin. Sur la libera loko oni konstruis larĝajn urbajn stratojn kaj parizanoj nomis ilin *boulevard* – en traduko ja „muregaj stratoj“. La franca *boulevard* devenas el holanda *bolwerc* – murego, ligna barilego, traba muro.

En parizaj bulvaroj dum 18-a kaj 19-a jarcento krom butikoj, kafejoj kaj restoracioj oni aranĝis teatraĵojn, kie ludis en surbulvardaj teatroj akrobatoj, mimoj, komikajn operetojn. Tiel la vorto „bulvár“ estiĝis sinonima por ĉio ne tro serioza, ne nur pri teatraĵoj, sed ankaŭ por ĵurnalo kaj poste al aliaj komunikiloj.

Laŭ alia klarigo de la vorto „bulvár“ (por ĵurnalo) ĝi estiĝis komence de la 19-a jarcento, kiam sur ĉeĥaj bulvaroj vendis kamelotoj malseriozajn ĵurnalojn kun krio – iam nomataj „plátky (pl.) plátek (sg.)“.

La vorto „plátek“ signifas precipe maldikan tranĉaĵon ekzemple de citrono aŭ valora metalo, kaj devenas el la germana *Platte* – kiu devenas el greka *platýs* – larĝa. „Plátek“ kiel „bulvár“ – malserioza ĵurnalo - devenas el germana *Blatt* – ĵurnalo, kiu komence signifis folion de planto. Cetere la ĉeĥa vorto „list – listy“ signifas plantaj folioj, sed ankaŭ ĵurnaloj. Estas interese, ke „plátek“ kaj „bulvár“ estas malseriozaj, sed „list – listy“ ĉiam en la ĉeĥa lingvo indikas tute seriozajn revuojn.

### Ŝrapnelo – ĉeĥe „šrapnel“

Ni komencu per informoj el historio de artilerio. La unuaj kanonistoj uzadis kiel materialo ŝtonojn, pli poste feron, formitan kiel kugloj. Poste progrese en murdado aperis grenado, kiu post faligo teren eksplodis. Ankoraŭ pli efikaj estis obusoj - „kartáče“ – (*Riegerův slovník naučný* – Leksikono aŭ enciklopedio de Rieger) priskribas tiujn ĉi artilerian „kartáč“ per beletaj vortoj: „Lada ujo en cilindra formo plenigita per hakita fero, aŭ per pecoj de gisaĵo,

nomita „kartáč“ (ĉeĥe signifas broso). Ĝi post elpafo krevas kaj disŝutas pereon en malamikajn vicojn.“

Tia estis stato en la dua duono de la 18-a jarcento. Sed laŭ opinio de brita artileria oficiro, kiu dudekjara pasis armean servon en la jaro 1781 en ĝibraltara fortikaĵo sieĝita de hispanoj, estis grenadoj kaj „kartáče“ tre ege malŝparemaj. Li kalkulis, ke britaj kanonoj pafis du mil foje kaj mortigis nur 26 hispanojn. Skandala malefiko! Li volis tion ŝanĝi. Entuziasme faris provojn per propraj elspezoj, estante lerta. Li sukcesis kunigi ecojn de mitrajloj kaj „kartáč“. Malplenan obuson plenigis per plumbaj kugloj kaj enŝutis pafan pulvon. La pafaĵo post la falo eksplodis kaj per forto disflugis en ĉirkaŭaĵon kaj murdis. Unue estis uzita lia invento en la jaro 1804 dum sieĝo de nederlanda kolonio en Surinamo kaj plibonigita, kompreneble, oni uzas ĝis nun.

Certe vi pensas, ke mi nun diros kial al tiu miksaĵo de obuso kaj „kartáč“ oni nomas ŝrapnelo. Jes, la brita oficiro nomiĝis Henry Shrapnel. Do la vorto ŝrapnelo apartenas en grandan familion de vortoj „monumentoj“, memorigantaj al ekzistantaj personoj. Ekzemple: sendviĉo, rentgeno, drezino, pralino, kabei...

Tamen mi devas aldoni kelkajn vortojn pri interesa vorto „kartáč–(broso)“, kiun oni ĉe ni uzas por unu speco de artileria obuso kaj ankaŭ precipe por ilo por purigi mantelon. Krom tio, ke oni sonas same, tute ne rilatas unu al la alia. „Kartáč“ – laŭ *Vortaro de skriba ĉeĥa lingvo* - estas ilo por senigo de polvo el ŝtofoj, por purigo kaj poluro. Kaj „kartáček“ – broseto – ni konas precipe kiel dentobroseto. Ĝi devenas el itala verbo *cardegiare*, kiu signifas kombi lanon. Kaj tiu itala vorto rilatas al greka substantivo *carduus* – kardo, ĉar la lanon oni tondis – brosis – prilaboris per difinaj specoj de kardoj. Al la ĉeĥa lingvo venis la vorto tra germana lingvo – *Kardätsche*.

„Kartáč“ kiel obuso ne rilatas al kardo, sed ankaŭ ĝi venis al ni de la itala denove tra la germana. Germanoj nomas „kartáč“ – obuson *Kartätsche* laŭ la itala *cartoccio* – sako, (paper-)korneto, pakumo, ombriilo kaj ankaŭ papera obusingo. *Carta* – estas itale karto, malmola papero, devene el la latina *charta* - ĉarto.

Do – al parenkaro de artileria obuso apartenas kartoĵoj – per kiuj ni ludas, kartoĵoj – en kiuj kuracistoj aŭ policistoj enskribas, sed ankaŭ kartografio, eĉ kartelo – kiu estis origine skriba interkonsento – interkonsento sur papero.

traduko el la ĉeĥa lingvo Drahotová

## Diraĵoj – citaĵoj

Ŝatataj taskoj por traduki en Skokovy en Ĉeĥa  
paradizo

Fantazio – ne estas imago pri objektoj, kiuj ne ekzistas, sed fari ion, por ke ili povu ekzisti.

Karel Čapek, elstara ĉeĥa verkisto.

Se vi tuj ne havas sukceson, klopodu plu. Sed poste ĉesu. Ne valoras esti obstina frenezulo.

William Claude Fields.

Estas bele komune silenti, sed pli bele estas komune ridi.

Friedrich Nietzsche.

La tempo fluas diverse, laŭ tio kun kiu.

William Shakespeare.

Ĉiuj libroj flaviĝas, sed libro de naturo aperas ĉiujare en nova, ĉarma eldono.

Hans Christian Andersen.

Objektoj havas nur valoron de ĝojo, per kiu ili povas efiki.

Richard Aldington.

Amikeco estas parto de homa feliĉo.

Jan Werich, fama ŝatata ĉeĥa artisto.

Ne estas grizaj tagoj. Nur lacaj okuloj ne volas vidi ilian eksterordinarecon.

Jan Werich.

La homo bezonas por feliĉo kaj kontento ne nur korpan komforton, sed ankaŭ la animan.

Jan Werich.

La vera sekreto de vivo estas serĉado de beleco.

Anatole France.

Sistema laboro venkas ĉion.

Vergilius Maro Publius.

Vera amiko estas la plej granda el trezoroj. Tamen homoj klopodas akiri pli malgrandajn trezorojn.

Francois de la Rochefoucauld.

Fantazio estas patrino de poezio, sed ankaŭ de universala historio.

Theodor Mommsen.

**El Informilo** – monata gazeto de E-handikapuloj, numero. 59/22 novembro 2006

## **Bela okanzitaĵo**

Foje sur ŝtuparo antaŭ domo sidis blindulo kun ĉapelo ĉe siaj piedoj. Apude estis tabuleto kun surskribo: „Mi estas blinda. Mi petas, helpu al mi.“

Preteriranto vidis, ke la blindulo havas en ĉapelo nur kelkajn monerojn. Li kliniĝis kaj metis en la ĉapelon kelkajn monerojn kaj poste sen demando prenis la tabuleton kaj sur ĝian dorson skribis alian frazon. Posttagmeze li revenis al la blindulo kaj rimarkis, ke la ĉapelo estas plena de moneroj kaj bankbiletoj. La blindulo laŭ sonoj de la paŝoj ekkonis la viron kaj demandis lin: „Ĉu vi estas tiu homo, kiu sur mian tabuleton skribis alian tekston? Kaj kion vi do skribis?“

Sed viro nur respondis: „Nenion, kiu ne estus vero. Nur mi ŝanĝis formon de sciigo.“

Li ekridetis kaj forpaŝis. Kaj la blindulo neniam eksciis, ke sur la tabuleto estis skribite: „Estas printempo, sed mi ne povas vidi ĝin.“

Kiam iu afero ne sukcesas, ni provu fari ĝin alimaniere, malgraŭ tio iam estas malfacila.

Traduko Jarmila Rýznarová  
Ĉeĥio.

**El MONATO** – internacia magazino sendependa

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-20000 Antwerpen, Belgio

## **Prezidi la propran psikon**

La slovena prezidanto Janez Drnovšek, politike aktiva dum 20 jaroj, ekiris laŭ nova vojo. Operaciita pro kancero kaj ne tute kuracita, li decidis turni sin al alternativa vivmaniero.

Nun Drvošek, kiu prezidis Jugoslavion en 1989 kaj 1990 kaj inter 1992 kaj 2002 la slovenan registaron kaj en tiu ĉi jaro fariĝis prezidanto, vivas en kampara domo kaj nutras sin laŭ sanigaj metodoj. Tiel li intencas kontraŭbatali la malsanon per la propra psiko.

Tamen samtempe li uzas sian pozicion por diversaj homaranismaj entreprenoj. Li iniciatis intertraktojn inter la serba registaro kaj kosovanoj; li engaĝiĝis por helpi la endanĝerigitan popolon de Darfur en Sudano starigi

tendaron por rifuĝintoj; kaj li klopodis venigi por intertraktoj en Slovenion la sudanan registaron kaj reprezentantojn de la ribelantoj.

Justeco kaj evoluo.

En Slovenio li fondis movadon por justeco kaj evoluo kiel neregistaran organizaĵon. Li vizitis Izraelon, kie li renkontiĝis kaj kun judaj kaj kun palestinaj gvidantoj kaj klopodis persvadi ilin plu intertrakti por trovi pacan interkonsenton.

Drnovšek diras: „La vivo estas momentoj de la nuno. Se ni helpas al aliaj homoj, ni sentas, ke nia vivo havas sencon. Se ni ne ŝarĝas nin per tro da zorgoj kaj postuloj, ni estos kvietaj kaj ni ne malsanos. Se ni komence ordigos nin kaj nur poste ni klopodos ordigi la aliajn, ni eble estos sukcesaj. Se ni ne mensogos al ni mem kaj al la aliaj, la mondo estos multe pli simpla. Kaj en tia mondo ni povos esti feliĉaj.“

Zlatko Tišljariĉ  
MONATO junio 2006/6, paĝo 10.

## **Konfuzo kaj kontraŭdiroj**

La 29-an de marto 2006 okazis en Togolando eklipso de la suno. La registaro deklaris la matenon de la eklipso - tago ferio - kaj togolandanoj restis hejme. Tamen antaŭe kaj dume regis konfuzo kaj kontraŭdiroj.

Ĉirkaŭ du semajnojn antaŭ la eklipso amaskomunikiloj atentigis, ke oni dume nerigardu la sunon pro blindiĝo-danĝero. Rezulte homoj aĉetis ĉe apotekoj apartajn okulvitrojn. Tamen tri tagojn antaŭ la eklipso oni aŭdis, ke okulvitroj, kiujn disponigis al la popolo la registaro, ne protektas kontraŭ blindiĝo.

Anstataŭe estis dirite, ke oni restu hejme, enfermita en la propra ĉambro, kaj ne rigardu la eklipson. Krome rondiris diversaj onidiroj: oni malŝaltu elektronikajn aparatojn, kiuj dum eklipso difektiĝos; oni translokiĝu, se oni loĝas en domo el pajlo aŭ konsistanta el feraĵoj, ktp. Multaj homoj panikis, aĉetante antaŭ la eklipso-tago manĝaĵojn kaj alian provianton.

Rabistoj.

Venis la tago mem kaj la ordonoj de la registaro estis klaraj: „Ĉiu restu hejme, en la ĉambro kun fenestroj kaj pordoj fermitaj.“ La stratoj de la ĉefa kaj aliaj urboj restis senhomaj kaj la popolo sekvis la progreson de la eklipso per televido- kaj radio-raportoj. Tamen ne ĉiu restis hejme: rabistoj diversloke profitis la okazon por priŝteli bienojn kaj butikojn aŭ forpreni bredatajn dombestojn.

Ĝuis la fenomenon ankaŭ turistoj, kiuj spektis la eklipson per siaj okulvitroj. Rezulte multaj togolandanoj malkontentis, dirante, ke ilin trompis la

registaro, ĉar la eklipso ne tiom timigis, kiom ili atendis. Ekzemple, la prognozata nigro similis al tiu de pluva tago kaj ne al plena nokto.

Tiuj, kiuj memoris la lastan eklipson en Togolando en 1947, diris, ke tiam estis pli mallume. Nun togolandanoj devos atendi ĝis 2081, kiam okazos la venonta eklipso en ilia lando.

Gbeglo Koffi/pg  
MONATO 2006/6, paĝo 10.

## Lingvaj problemoj

En mia loĝurbo Augsburg policianoj lernis la rusan lingvon, por ke ili povu pli bone interkomuniki kun rus-germanoj, kiuj amase vivas ĉi tie, sed nur malamase scias kaj lernas la germanan. Renversita mondo? Ne, sed tio necesas por sekurigi la urbon. Ĉar turkoj jam de multaj jaroj vivas en Augsburg, la polico disponas jam pri sufiĉe da turkdevenaj kolegoj, do kun tiu grupo de enmigrantoj oni ne havas lingvajn problemojn. Kelkaj politikistoj ĵus proponis, ke oni prezentu turkan version de la germana nacia himno, por ke ankaŭ turkoj povu kanti ĝin – tio helpos integriĝi, argumentis verdula politikisto, ĉar ĝi estos „simbolo por multlingveco de Germanio“. Sed kristandemokrata politikisto objctis: „Tio estus malo de integriĝo.“ La germanaj kandidatoj por la konkurso de eŭropaj televido pri kanzonoj prezentas jam de jaroj siajn kantojn ne en la germana, sed en la angla lingvo. Preskaŭ neniu protestas. Protestoj tamen jen kaj jen aperas kontraŭ la „germanla“. Kontraŭ superflua anglismo nun agadas triopo de fakuloj pri germana lingvo. Precipe en reklamlingvaĵo abundas tiaj monstraĵoj tiel, ke laŭ freŝaj esploroj ilin komprenas nur 8% de la germanaj klientoj. Per ilia agado „Vivanta germana“ ili volas proponi ĉiumonate tri germanigojn de anglismoj, ekzemple por *homepage* (Startseite=startpaĝo).

Jen nur kelkaj facetoj el longa listo de lingvaj problemoj en Germanio. Sed preskaŭ ĉiuj germanoj favoras la anglan, lingvon de tutmondiĝo. Fervore oni lernas ĝin. 12-jara filo de konato tamen ne bone progresas en angla kurso de la lernejo kaj tiel riskas ne atingi la pli altan klason. Do la patro sendis lin por unusemajna lingva kurso al Malto, je 1250 eŭroj. Imagu, se oni proponus al usona patro sendi filon al Germanio por ke li pli bone lernu tiun lingvon, oni deklarus vin frenezan. Kial lia filo lernu akcesoran, sensignifan lingvon, se li ja posedas la mondlingvon? Germanoj ne vidas tian maljustaĵon, tamen plendas pri malgraviĝo de sia lingvo. Estus interese ekscii de niaj legantoj, ĉu similajn lingvoproblemojn oni havas en aliaj landoj. Skribu al Monato!

Sincere via  
Stefan Maul  
ĉefredaktoro.de MONATO

junio 2006, paĝo 5.



## **El la libro – Tridek jarojn en la ora nordo**

pri Jan Welzl

Esperantigis kaj eldonis Moraviaj Esperanto Pioniroj  
en Olomouc 1931

### **Antaŭparolo**

Proksimume en la jaro 1924 komenciĝis penetri en Ĉeĥoslovakujon famo pri stranga ĉeĥa viro, kiu fine de pasinta jarcento forlasis sian patrujon kaj nun kiam en ĝi tiom multe ŝanĝiĝis, ne kuraĝas viziti ĝin. En la hamburga haveno li laboregas kiel taglaboristo, sed la historio de lia vivo estas tiom mireginda kaj nekredebla, ke li altiras ĉiuf flankan atenton ankaŭ en haveno, en kiuj strangaĵoj certe estas oftaj.

Kaj baldaŭ oni eksciis iom post iom, nur po parte, kia homo estas Jan Welzl kaj kiaj estas liaj travivaĵoj. Estante junulo li foriris el sia hejmo en Zábřeh en norda Moravio, piede li marŝis al Genova, de tie li veturis al Ameriko kaj reen preter Afriko kaj trans la Hindan Oceanon al Vladivostok kaj poste al Irkutsk, de kie li piediris trans Siberion ĝis la Arkta Maro kaj ekloĝis sur la insulo Nova Siberio inter Eskimoj. Li ĉasis tie kaj negocis, oni elektis lin estro, li akiris konsiderindan havaĵon, sed en la jaro 1924, kiam frakasiĝis lia malgranda ŝipo sur la bordo de Pacifiko ĉe Usono, oni arestis lin kaj eskortis lin al Eŭropo, ĉar li ne posedis dokumentojn. Li haltis nur en ĉeĥoslovaka konsulejo en Hamburg. Li ne havis monon kaj sciis, ke ne eblas venigi al si iom da sia havaĵo de la limoj de homaj sidejoj sur la insulo en la Arkta Maro. Kiel tio povus okazi? Post kiom da jaroj ricevus liaj amikoj sciigon pri lia akcidento kaj post kiom da jaroj alvenus la mono?

Praktikulo, kiun malkuraĝigis neniam klopodoj kaj laboro, tuj komencis labor-enspezi, por ke li povu vojaĝi reen. La afero ne estis facila, sed tamen iun tagon li sukcesis enŝipigi sin en brutŝipon, per kiu – parte por faritaj laboroj, parte je kontanta pago – oni transportis lin al Kanado. Tie li sukcesis fari negocon je vivaj kastoroj. Li profitis, sed kiam la negoco estis efektivigita, alproksimiĝis la vintro kaj ne estis eble eĉ pensi pri vojaĝo norden.

Li havis dolarojn. Sed ĉu ne estus preferinde profiti je la valuta diferenco kaj atendi ĝis la printempo en Eŭropo? Li revenis. La unuan fojon li veturis al Ĉeĥoslovakujo, al malmultekosta lando, kiel li supozis. Sed ĉi tie nur li spertis, ke la dolaroj malpli iĝis preskaŭ same rapide kiel estus okazinta en Ameriko, kaj ke la restado ĉi tie estas pli multekosta je tiu longa vojaĝo al Eŭropo.

Tia eraro sufiĉus, por malesperigi kelkiun. Sed Welzl perceptis la aferon tiel, kiel ili venis kaj li ĉirkaŭrigardis, kiel li povus labor-enspezi. Kaj tiam oni invitis lin verki ĉi tiun libron, kiu ebligis al li – minimume – lian duan forveturon.

Tio estas mallonge priskribitaj travivaĵoj de Jan Welzl. Kompreneble ĉi tiuj travivaĵoj kaj ĉio antaŭokazinta formis karakteron de la ĉeĥa eskimestro. Sed

ne havu falsan impreson! Ne temis pri maldika oststatura, ruinigita homo, kiun la maro ĵetis sur bordon. Imagu fortan, rondforman, bonfartan gastejmastron. Tiel proksimume aspektis tiu maljuna maristo kun sagacaj, ĉiam duonmalfermitaj, bluverdaj okuloj kun iometo da delikataj, vatformaj, blankaj haroj sur la kapa verto, kun blankiĝantaj, supren torditaj lipharoj, kun ia ŝalo ĉirkaŭ la kolo anstataŭ la kolumo kaj kravato. Bonkora, sincera, laŭŝajna cedemulo, kiu fine tamen ĉiam sukcesis efektiviĝi sian volon.

Simbole estas, ke lia verko aperas nun en la lingvo, kiu laŭ sia substanco mem estas esprimo de internacieco, ĉar ĉi tiu ĉeĥa kabanaĉulo, Jan Welzl fariĝis per sia vivo internacia tipo de homo, kiu hodiaŭ, en la jaroj de sia maljuneco, efektive ne scias plu bone iun el la multaj lingvoj, kiujn li devis uzi dum sia migrado. La scipovo de lia gepatra lingvo – la ĉeĥa – konsiderinde malpliĝis, la alian lingvon, kiun li scipovis de post sia junaĝo – la germanan – li uzis malofte, el la rusa li sciis nur tiom, kio estas plej grava, la anglan li parolis kiel elmigrulo, kiu kompreneble neniam lernis ĉi tiun lingvon laŭsisteme. Li scipovis dek tri mongol-eskimajn lingvojn, kiujn li parolis. Okazis, ke dum aŭdienco ĉe la prezidento de la ĉeĥoslovaka respubliko la prezidento Masaryk provis per ĉiuj lingvoj, kiujn li scipovas – kaj ne estas malmulte da ili – interkompreniĝi kun Welzl, sed fine li ekkonis, ke Welzl posedas efektive neniun lingvon, per kiu li kapablas bone kaj flue esprimi ĉion, pri kio li pensas.

Ĝuste en ĉi tiu esperanta eldono de lia libro estas necese unuavice akcenti liajn lingvajn malfacilaĵojn. Estas necese tiamaniere klarigi, kun kiaj malfacilaĵoj estis verkita ĉi tiu libro, kian paciencon ĝi postulis kaj kiom da miskomprenoj devis esti klarigataj kaj forigataj, ĉar la maljuna eskimestro ne havis unufirmajn esprimrimedojn. Estis necese havi ĉiam uzoprete vortarojn de ĉiuj lingvoj, kiujn Welzl ektuŝis iam, liajn eksplikojn oni devis sekvi laŭ detalaj geografiaj kartoj kaj ofte laŭ natursciencaj kaj geografiaj libroj. Kelkfoje daŭris eĉ unu horo kaj pli, ol la kunverkantoj de Welzl interkonsentis pri unusola nocio kun li. Ofte li devis detale priskribi la aferon, por ke oni eksciu, pri kio temas. Li estis majstro en tiaj priskriboj, tial kelkloke en ĉi tiu libro oni lasis ilin ne tuŝitaj.

Plua malfacilaĵo estis, ke Welzl nepre ne scipovis geografion. Maristo, vagulo, kiu tramigris duonon de la mondo, distingis sur geografia karto – laŭvorte esprimite – eĉ ne la nordan poluson de la suda. Tiel estis eble sekvi liajn vojaĝojn nur laŭ precize indikitaj geografiaj lokoj, preter kiuj Wenzl migris. Ĉi tiu laboro estis proporcie facila, se Wenzl marŝis sur kontinento, sed la problemo estis pli malfacila, se temis pri vagado en la plej nordaj partoj de la Arkta Glacia Maro, kie oni povis apogi sin preskaŭ je neniuj fiksa punkto, precipe en la lokoj de la proksimuma migrado de Welzl estis troveblaj en geografiaj kartoj blankaj facoj nome signo por nekonata, neesplorita regiono, „terra incognita“. La afero estis des pli malagraba, ĉar Welzl scipovis indiki parkere latitudojn kun kromordinara precizeco, sed meridianojn li nepre ne atentis; evidente li ne konsideris ilin ekzistantaj.

Fine plua malfacilaĵo, sed malgrava kompare al la supre menciitaj, estis neceso, diferencigi la senperajn spertojn de Welzl kaj okazaĵojn pri kiuj li aŭdis nur kaj kiujn li kredis kun infana naiveco de primitiva ĉasisto malgraŭ tio, ke temis pri evidentaj sensencaĵoj. Sed tie, kie eĉ la plej simpla leganto ekkonos, ke la opinio de Welzl estis malĝusta, intence li lasis ĉi tiun reflekon de bela infana kredo de Welzl, ĉar ĝi kromordinare pligrandigas la poezian ĉarmon de liaj priskriboj. Koscie Welzl neniam diris malveron. Liaj kunlaborantoj havis okazon konvinkiĝi pri tio ĉiun minuton. Okazaĵojn centfoje interplektitajn, al kiuj oni revenigis Welzl-on post semajnoj denove kaj denove kaj al kiuj oni venis de alia flanko kaj en alia kunteksto, li rakontis nepre same kaj, se estis eble sekvi liajn travivaĵojn laŭ la geografiaj kartoj, li pruvis per ĉiu vorto la plej perfektan, ofte preskaŭ nekredoblan konon de ĉiu kvadrata mejlo de la arkta regiono.

Kiel estiĝis ĉi tiu verko? Kompreneble la rakontado de Welzl ne okazis kontinue. Ne temis pri kancelaria laboro. Nepre ne. Temis pri amikaj bonhumoraj interparoloj en privata loĝejo ĉe kafo, teo, rumo, en fumaj nuboj kaj inter maĉpecoj de elspuita tabako, intervjuo daŭranta du monatojn. Sed ne temis pri hazarda babilado. Du redaktoroj, kiuj laboris kun Welzl pri ĉi tiu verko kaj laŭvorte stenografis lian rakontadon, direktis ĝin celkoscie tiel, ke la ĉefaj trajtoj de lia vivo estu fiksataj en unua linio kaj precipe, ke per preciza priskribo de ĉiuj detaloj, kiuj formis kadron de la vivo, la priskribo fariĝu plej fidela. La verko estiĝis per miloj da demandoj, kiuj kelkfoje koncernis laŭŝajne ne tro gravan priskribon de aferoj, kutimoj, aĉeraĵoj, kies ekspliko tamen klarigis kelkion, kio aliokaze estus restinta nekomprenebla, nekompleta, eĉ se ne tute malĝusta. En tiom diferenca medio, en kiu Welzl vivis tridek jarojn, estis ja tiom da aferoj, kiujn la maljuna eskimestro kreskinta en nordo entute ne konsideris menciindaj, kiuj tamen en niaj okuloj brilis per nekutimaj koloroj!

La eldonantoj de la esperanta traduko petis, ke la kunlaborantoj de Welzl detale priskribu la manieron de sia kunlaboro dum verkado de ĉi tiu libro. Plej bone karakterizas ĉi tiun laboron, kiu certe ne estis neinteresa, priskribo de la unua tago, de kiu oni komencis verki ĉi tiun libron. La priskribo sekvas en la postparolo.

Kio reprezentas la plej grandan valoron de la verko de Welzl? La simpleco, la kruda senpereco de liaj priskriboj, la kvieta memkomprenebleco, kun kiuj li priskribas la terurojn kaj belaĵojn de la arkta vintro. Alimaniere ne povis priskribi ĉi tiujn regionojn viro, kies hejmo estis en lokoj, kiuj estis tomboj de tiom da esploristoj, kaj kiu nur de tie entreprenadis ekskursojn je miloj da kilometroj ĉiufanken ne pro amuzo, sed por vivi kaj serĉi vivrimedojn kaj kiu tial observis ĉi tiujn regionojn ne kun senspirita fataleco, sed kun perceptemo de necedema komercisto, dotita de la naturo per granda inteligenco kaj per senco je percepto. La verko de Welzl estas valora ne nur laŭ la literatura vidpunkto, sed ankaŭ kiel kromordinare grava fonto, el kiu oni povas ĉerpi certe valorajn sciojn daŭrigante esplorojn pri la vivo en plej malproksima nordo, sur la limo de homaj

loĝejoj. Fine per ĉi tiu priskribo de frapantega, kruda vivo de vagulo estas fotografita ne nur aventura kaj ekscitanta lukto de simpla homo por bona vivo kontraŭ plej krudaj eksteraj malagrablaĵoj kaj malfacilaĵoj, sed samtempe respeliĝas en ĝi malsarena tragedio de invado de civilizacio kaj senkompata marŝo de koloniigantoj en netuŝitajn landojn, kiuj kaŝis treegajn riĉaĵojn.

Welzl forveturis en junio 1929 trans London, Quebec, Prince Rupert, Dyea, Dawson kaj Nome denove al la Glacia Maro. Ĉeĥo, kiu travivis tridek jarojn en la plej malproksima nordo kaj akiris tie la rangon de eskimestro, meritas certe la nomon de la plej aventura Ĉeĥo. Sed viro, kiu en sia sesdek-dua jaro denove malaperas en tiuj regionoj, por vivi tie en sia groto kaj suferi denove terurajn malagrablaĵojn de la arkta naturo kaj por denove lukti, tiu viro estas unu el la plej aventuraj homoj entute.

La kunlaborantoj de Welzl estis konvinkitaj, ke ĉi tiu verko havos sukceson eĉ hejme, eĉ eksterlande. Ili estas ĝojigitaj per la cirkonstanco, ke la internacia sukceso de la verko nun estas kompletigata per la traduko en Esperanton, la esencon de ĉiuj lingvoj.

Bedřich Golombek  
Eduard Valenta  
Brno, novembro 1930.

Post 75 jaroj la nomo de Eskymo Welzl estas en Ĉeĥio bone konata kaj la verko per unika lingvaĵo ŝatata. En naskiĝurbo Zábřeh na Moravě staras interesa statuo de heroo kaj okazas regulaj gajaj festoj sur neĝo.

Eskymo Welzl mortis je la 19-a de semptembro 1948 en Dawson en Alasko duoninsulo. Lia tombo kaj muzeo tie estas vizitataj ne nur de ĉeĥoj. Lokaj nordanoj memoras Welzl-on ankaŭ kiel teknikan eltroviston.

J.D.

**El la revuo Esperantisto Slovaka** – slovakoj estas fratoj de ĉeĥoj, ĝis la jaro 1993 vivis en ŝtato Ĉeĥoslovakio, poste ĉeĥoj kaj slovakoj pace disiris.

### **Se mi...**

Saĝulo Bajazid foje diris: „Kiam mi estis juna, mi estis revoluciulo, mi volis ŝanĝi ĉion. Kaj tiel mi petis Dion: „Sinjoro, donu al mi forton por ŝanĝi la mondon.“

Kiam mi estis mezaĝa, kaj mi konsciis, ke dum la duono de mia vivo mi ŝanĝis nenion, do mi ŝanĝis mian preĝon: „Sinjoro, donu al mi gracon por ŝanĝi tiujn, kun kiuj mi renkontiĝadas, almenaŭ miajn familianojn kaj miajn geamikojn, kaj mi estos kontenta.“

Nun, kiam mi estas maljuna, kaj miaj tagoj estas sumigitaj, mi ekkomprenis, kia freneza mi estis; tial mia preĝo nun estas: „Sinjoro, donu al mi gracon por ŝanĝi min.“

Se mi estus tiel preĝinta de mia junaĝo, certe mi ne prodigus mian vivon.

El la libro de Bruno Ferrera esperantigis M.Tomašicová.

### **El kovrilo de revuo**

Jen la Slovako: li estas paca, laborema eĉ sklave, naturon kaj Dion amanta. Sed kiam li estas kortuŝita de maljusteco, li kuras en sian eternan rifuĝejon, en sian Dian preĝejon, al la montaroj. Kaj tie, starante sur rokoj-pintoj, li forkrias sian doloron: la maljustecon, en la mondon... aŭ li batalos por sia idealo ĝis la morto...

60-a jaro, marto 2006, No 1.

### **Intervjuo kun edzo de esperantistino**

Jes. Mi ŝatas Esperanton. Mi estas tolerema homo. Sed ĉio havu siajn limojn.

De kiam mia edzino esperantiĝis, mi sentas min ofte sola. Jes. Mi ankaŭ eklernis Esperanton, mi eĉ partoprenis kurson. Dum la tuta semajno mi pro ĝojo de mia diligenta kaj pacienca lektorino klopodis memori kelkajn esperantajn esprimojn – sed mi ne sukcesis. Simple – mi ne havas talenton por lingvoj.

Mi ŝatas Esperanton. Sed mi ne vidas ĝian celon. Kial mi diable veturu malproksimen por babili kun fremdaj homoj? Kaj kial ŝi bezonas tion? Ŝi do havas ĉion hejme: grandan loĝejon por ordigado, televidilon por kulturo, ĝardenon por kultivadi kaj min por zorgado.

Sed ĉio-ĉi ne sufiĉas al ŝi. Tiu konstante ne kontenta persono bezonas senĉese vagadi ie, kaj se mi ne volas restadi sola, mi devas veturi kun ŝi, forlasi mian sendanĝeran ekziston... pardonu min, mi devas ankoraŭ paki mian vojaĝpakaĵon, ĉar ŝi denove elpensis partopreni ian kongreson aŭ kion, ĉiuj diabloj scias, en kiu infero...

Mária Minichová  
2/2006 Esperantisto Slovaka, paĝo 9.

## Ĉu ĉiuj niaj mondsavaj ideoj validas plene?

Ie en interreto oni trovis tiun ĉi pripenson:

Unua demando:

Se vi konus virinon, kiu estas graveda, kiu havas jam ok infanojn, el kiuj tri estas surdaj, du blindaj, unu mense tarda kaj ŝi mem suferas per sifiliso, ĉu vi rekomendus al ŝi aborton?

Dua demando:

Oni elektas reganton de la mondo, kaj via voĉo elektu el la proponitaj kandidatoj A B C:

A: Li partneriĝas kun politikistoj, kiuj ne ĉiam agas honeste, kaj siajn agojn li konsultas kun astrologo. Li havas du amatojn. Li fumas kaj trinkas 8-10 glasojn da brando ĉiutage

B: Dufoje oni lin maldungis el okupiĝo. Li dormas ĝis tagmezo, dum universitata studado li uzis opion kaj ĉiuvespere trinkas kvaronon da botelo de viskio.

C: Li estis ordenita kiel soldata heroo. Li estas vegetarano, ne fumas, nur okaze li trinkas bieron kaj havis neniujn eksteredzecaĵajn aferojn.

Por kiu kandidato vi voĉdonus?

Bone pripensu kaj nur poste legu sube:

Respondoj:

de unua demando: Se vi respondis „jes“, vi ĵus mortigis Beethovenon.

de dua demando:

Se vi voĉdonus por kandidato A – vi voĉdonus por Franklin D.Roosevelt.

Se vi voĉdonus por kandidato B – vi voĉdonus por Winston Churchill.

Se vi voĉdonus por kandidato C – vi voĉdonus por Adolf Hitler.

## Vivo kun insektaro en paco - hejmaj konsiloj

Volas kun vi vivi **formikoj**? Ili jam konstruas al via ŝranko ŝoseon en paketon kun sukero? Gastigu ilin per teleretoj kun trinkaĵo: unu kuleron da sukero donu en duonlitron da akvo kaj disigu en ĝin du kulerojn da gisto. Nepre deziri al formikoj bonan apetiton!

Ne ĉiu homo estas objekto por **kuloj**. Sed iaj homoj estas suferigataj de ili tre multe. Avinoj diras, ke tiuj homoj havas dolĉan sangon. Kaj avinoj konsilas: Ŝmiru vin per porka graso. Se tio ne sufiĉas, preparu por vi ŝmiraĵon el konata menta akvo kun alkoholo - „Francovka ALPA“: En unu decilitron metu kulerecon da spicaĵo „kariofilo“. Jam post semajno vi povas komenci uzi la ŝmiraĵon. Ĝin ŝmiru nokte fruntan kaj brakojn. Ĝi bele aromas kaj alvokas dormon. Ankaŭ ĝi efikas desinfekte. Laboristoj en naturo ŝmiras fenestrojn de siaj vetureblaj loĝejoj per ŝmiraĵo INDULONA.

Ĉu vi konas **tineojn**? Ili estas papilietoj, kies idoj gustumas viajn vestaĵojn. Ili preferas fermitan ŝrankon, kien vi redonas vestaĵon sen antaŭa purigo aŭ lavado. Kontraŭ ili sufiĉas aerumi la vestaĵon, prefere ekstere dum la frosto. Tineoj malŝatas sapon kaj lavpolvon, do sufiĉas lokigi ilin en la ŝrankon. Same bone vi faros, kiam vi metos inter tolaĵo la saketon kun lavendo aŭ timiano aŭ rosmareno aŭ salvio aŭ artemizio (absinto).

**Abeloj kaj vespoj** estas utilaj, sed ilia piko povas esti danĝera. Sed ili ne atakas, se vi estas trankvilaj ili ne estas agresemaj. Kondutu pace kaj ne ofertu al ili manĝaĵon kaj trinkaĵon, kiun vi volas manĝi aŭ trinki mem. Iliaj socioj havas sian kulturon kaj lingvon, kiel la esperantistaro, toleru ilin. Se tamen ili pikos vin, uzu hejme sur vundon cepon aŭ ajlon, sur la herbejo disŝiritajn foliojn de plantago.

**Muŝoj** estas ĉie. Ŝirnu kontraŭ ili fenestrojn kaj pordojn per reto. Ili malŝatas plantojn, kiuj ni uzas kiel verda spicaĵo: mento aŭ ocimo. La spicojn ni povas planti sur balkono, sur fenestroj kaj tiel, kiel diras la proverbo: vi detruos du muŝojn per unu bato. Ili ankaŭ onidire malŝatas vinagron. Provu en kuirejo meti sur telereton spongeton kun vinagra akvo.

## Lingva anguleto

### Ŝtelite el artikolo „Pri „la“ en Esperanto“ de Jan Werner

Informilo de AEH decembro 2006 Kol. 260/22

L.L.Zamenhof en LINGVAJ RESPONDOJ konsilas (al s-ro L.M. – Pri la uzado de la artikolo; el decembro 1906):

„Tute vane vi faras al vi multe da klopodoj kun la uzado de la artikolo. Vi devas memori, ke en nia lingvo la uzado de la artikolo ne estas deviga; sekve la plej bona maniero de agado estas jena: uzu la artikolon tiam, kiam vi scias certe, ke ĝia uzo estas necesa kaj postulata de la logiko, sed en ĉiuj dubaj okazoj tute ĝin ne uzu. Pli bone estas ne uzi la artikolon en tia okazo, kiam ĝi estas necesa, ol uzi ĝin tiam, kiam la logiko kaj la kutimoj de ĉiuj popoloj ĝin malpermesas. Se vi ekzemple diras: „venis tago, kiun mi tiel longe atendis“, via frazo estos ne tute bonstila, sed ne rekte erara, kvankam oni devus tie ĉi diri „la tago“; sed se vi diros: „hodiaŭ estas la dimanĉo“ anstataŭ „hodiaŭ estas dimanĉo“, tiam vi faros rekte eraron, kiu estos malagrabra por la oreloj de ĉiu bona esperantisto.“

*Jan Werner daŭrigas kaj eksplikas en sia longa artikolo pri detalaj „problemoj“ de „la“, cetere ĉeĥa lingvo vivas prospere tute sen artikoloj... do ĉeĥoj povas ofte erari...*

*Mi aŭdacis artikolon draste mallongigi:*

En la detala klasifikado laŭ Kalocsay kaj Waringhien ni vidas malfeliĉan klopodon iel ekspliki la duan parton de la zamenhofa regulo referencanta al „aliaj lingvoj“. Antaŭ nelonge mi legis analizan studaĵon de litovo A. Vaitilavičius, verkitan jen la 1970-aj jaroj, kun kies resumo mi konsentas:

„Rekomendo de Fundamenta Gramatiko uzi la artikolon kiel en aliaj lingvoj kaŭzas ĥaosan situacion. Tial ni devas obei nur la regulon de Fundamenta Ekzercaro, ke la artikolo estas uzata, kiam ni parolas pri objektoj aŭ personoj konataj. Bona konsilo por pruvi neceson de la artikolo estas ĝia anstataŭo per –tiu- aŭ -tiu ĉi-. Grava estas rekomendo de Zamenhof, en dubaj kazoj tute ne uzi la artikolon.“

*Jan Werner daŭrigas per abundaj ekzemploj kaj eksplikoj...*

*Mi ankoraŭ rememoras tekston el la libro „La homo, kiu defiis Babelon“, de Centassi kaj Masson, kiun mi nelonge tradukis al la ĉeĥa kaj kie oni priskribas aferon pri la artikolo jene:*

Alia fenomeno okazis post tiu unua luminiĝo; en cirkostancoj, kiuj ne mirigos la specialistojn de la psiĥa dumdorma aktiveco.

Lazaro ofte pridemandas sin pri la utileco de la difina artikolo. Li konstatis ties foreston en la rusa kaj la pola kaj ĝian ekziston en tri



okcidenteŭropaj lingvoj, la franca, la germana kaj la angla. Ĉu la difina artikolo estas vere necesa? Malgraŭ siaj pripensadoj, Lazaro ne sukcesis fari al si opinion.

Sonĝo tiros lin el embaraso... Sonĝo, dum kiu li vidas sin apud arbareto akompanate de sia onklo Jozefo kaj de sia instruisto pri helena lingvo Prof. Bileviĉ, diskutante pri la rolo de la difina artikolo

„Ni eniru la arbareton,“ diras Lazaro, „ni tie trovos iun, kiu helpos al ni.“

„Ĉefe ne en la arbareton,“ tiam ekkrias Prof. Bileviĉ, “ estas tie tri junulinoj ruĝe vestitaj, kiuj deziras al ni malbonon.“

La tri viroj turnas sin al la arbareto kaj timegante, vidas tri rufajn junulinojn ruĝe vestitajn. Lazaro aŭdas sin timegante ekkrii: „Jen **la** tri ruĝaj junulinoj!“ kaj li tuj vekigigas.

„Mi klare memoras,“ Zamenhof poste skribos, „ke mi tute konscie uzis la artikolon **la** por nomi la tri junulinojn. Alikaze, mi parolus pri tri ajnaj junulinoj kaj ne pri tiuj menciitaj de Prof. Bileviĉ.“

De tiam lia elekto estas farita kaj Lazaro povas senti sin kontenta, ke li sen la plej eta peno lernis, ke la difina artikolo ne estas tute senutila.

*En klarigoj sub linio la aŭtoroj de la libro skribas:*

La juna Zamenhof tiel montris, ke li estas treege sagaca. Ĉar la manko de difina artikolo povas foje kaŭzi diplomatiajn miskomprenojn. Ekzemple, en 1967, tio estis la kaŭzo de konflikto inter la du oficialaj versioj, angla kaj franca, samtempe akceptitaj, de la rezolucio N° 242 de la Sekur-Konsilantaro de UNO. En la unua, la angla esprimo „territories occupied in the course of the recent conflict“ (sen difina artikolo) povis komprenigi, ke la Izraelianoj estas petataj malokupi okupaciitajn teritoriojn, do neprecizigitan parton, dum en la dua versio, la difina artikolo (les territoires occupés...) klare indikas, ke ili devas forlasi ĉiujn teritoriojn. „La ambigueco de la angla teksto ne estas defendebla kompare kun la klareco de la franca teksto, kio cetere estas sufiĉe ofta en UNO,“ rimarkis Pierre Révol, plenrajta ministro el Francio, en la gazeto *Le Figaro* (11-a de Feb. 1992).

J.Drahotová

## Mendo de pico en la jaro 2015

Telefona teatraĵeto por du aktoroj: picovendisto kaj mendanto

P: Ni dankas al vi, ke vi telefonas al nia picovendejo.

M: Bonan tagon! Mi dezirus mendi picon.

P: Ĉu vi povas diri al mi vian identigan numeron?

M: Mia identigilo, momenton, ĝi estas 310204999-45-54610.

P: Dankon sinjorino Novotná. Vi loĝas en strato de Jirásek, via telefonnumero estas 642 642 589. Via firmaa numero ĉe Alianz estas 954 562 556 897 56, telefonlinio 47. El kiu aparato vi telefonas?

M: Kion? Mi estas nun hejme. De kie vi havas tiujn ĉi informojn?

P: Ni estas ligitaj al nacia informosistemo.

M: Do, bone. Mi dezirus mendi du el viaj specialaj picoj kun duobla porcio da viando.

P: Mi ne kredas, ke ili estus taŭgaj por vi.

M: Kial?

P: Laŭ kuracnotoj vi havas tro altan sangopremon kaj altan nivelon de ĥolesterolo. Via asekura kompanio por sanzorgo certe malpermesus tiun ĉi vian malsanigan elekton.

M: Ho, ve! Kion vi rekomendus al mi?

P: Vi povus gustumi nian soj-jogurtan picon, vi certe trovos plaĉon en ĝi.

M: Kiel vi supozas, ke ĝi gustos al mi?

P: Ĉar vi pasintan semajnon pruntis en biblioteko libron „Sojaj receptoj por gastronomoj“.

M: Bone, bone. Mi mendas tiujn du picojn, bonvolu, familian grandecon mi petas. Kiom ili kostas?

P: Bonege! Ili sufiĉos por vi, via edzino kaj por viaj kvar infanoj. Ili kostas 412 eŭroj.

M: Mi sciigos al vi numeron de mia kreditkarto.

P: Mi bedaŭras, sed vi devas pagi rekte. Vi jam trois limiton de via kredito.

M: Do mi rapidos al bankaŭtomato, ke mi havu monon pli frue, ol via ŝoforo alveturos.

P: Mi bedaŭras, sed via bankkonto estas malplena.

M: Ne gravas, alportu tiujn picojn. La monon mi havos. Kiel longe daŭros, ol vi alveturos?

P: Pro multe da mendoj mi supozas proksimume 45 minutojn. Se vi rapidas, vi povas alveturi al ni por picoj, kiam vi havos monon. Sed mi opinias, ke transporto de familiaj picoj sur motorciklo estas iom malfacila.

M: De kie vi scias, ke mi veturos motorcikle?

P: Ĉi tie mi legas, ke vi ne partopagis vian aŭtomobilon kaj vi devis redoni ĝin, sed via motorciklo estas pagita, do mi supozas, ke vi uzas ĝin.

M: Ho, kisu mian...

P: Atentu, kion vi diros. Pro honor-ofendo de ŝtata oficejo vi jam estis en la jaro 2009 kondamnita.

M: Hm.

P: Ĉu vi deziras ankoraŭ ion?

M: Ne, dankon. Fakte jes, ne forgesu alpaki tiujn du litrojn da kokakolao senpage, kiujn vi promesas en reklamo.

P: Mi bedaŭras, sed klaŭzo de nia reklamo malpermesas al ni senpage transdoni limonadojn al diabetmalsanuloj.

**El „Informilo“ – organo de AEH – Asocio de Handikapitaj Esperantistoj  
Pardubice, Ĉeĥio.**

## Kuniklo

### De Fons Janssens

Kuniklo de mia najbarino

Mia najbarino Maria havis kuniklon nomatan Medardo. Mi povis vidi ĝin tra la malalta heĝo inter niaj ĝardenoj.

Medardo ne estis tutsimpla kuniklo, kiaj ekzistas centmiloj. Ĝi estis tre bela kuniklo, kun tute neĝ-blanka felo, longaj oreloj, kiuj subite staris vertikalaj je la plej mallaŭta brueto, vivoplenaj ruĝaj okuloj, kiuj rigardis iom mediteme, kaj komika mallonga vosteto.

Ĝi ankaŭ estis tre saĝa. Kiam Maria alparolis ĝin, atente aŭskultis, kaj oni vidis, ke ĝi ĉion komprenis, kaj ke ĝi ĝuis la karesajn vortojn de sia mastrino; cetere tio estis reciproka.

Tute certe, Maria kaj ŝia Medardo estis feliĉaj estaĵoj.

Mia onklo Aŝilo

Mia onklo Aŝilo estas pasia ĉasisto. Dum la ĉassezono, ĉiun matenon li paŝas tre frue tra mia strato al iom pli malproksimaj arbaretoj. Je tagmezo li revenas tra la vastaj herbejoj kaj kampoj malantaŭ mia ĝardeno, kiuj ankaŭ apartenas al liaj ĉasterenoj.

Li aspektas kiel vera ĉasisto: verda mantelo, verda ĉapelo kun malgranda plumo, pufpantalono, altaj botoj, kaj granda ĉasaĵujo.

Malantaŭ li venas la maljuna ĉashundo Karlo, paŝante, ĝis la momento kiam ĝi povas flarante kuri por serĉi ĉasaĵon.

Kiam onklo Aŝilo envenas al mi, tio estas por iom ripozi, kaj por trinki tason da kafo, aŭ, prefere, glaseton da brando. Plej ofte la ĉasujo estas same malplena kiel je la komenco. Mi konas jam lian sciencan klarigon: Estas tro varme, tro malvarme, tro seke, tro malseke, tro vente, tro senvente, tro da ŝtelĉasistoj, tro da artefarita sterko, tro da bruoj, tro da aero-malpurigo, kaj tiel plu. Post sia ekspliko li bonhumore reiras hejmen, konvinkita pri sia profesia scio.

Mi pensas, ke li ne ĉasas por pafi ĉasaĵon, sed precipe por sia sano. Malgraŭ sia forta piptabako, siaj kvar glasetoj da brando ĉiutage, kaj siaj okdek tri jaroj, li ĝuas bonegan sanon. Laŭ mi li estas kandidato por iĝi centjara.

Mi perfortus la veron se mi dirus, ke li neniam trafas ĉasaĵon. Okazas, ke li havas kuniklon, leporon, fazanon, perdrikon... Kiam li trafas ion proksime de mia domo, Karlo venas tra la ĝardeno por fiere montri al mi kaptaĵon kaj por atendi sian mastron. Kompreneble Aŝilo estas tiam tre kontenta. Li laŭdas la hundon, konstatas ke hodiaŭ estas la optimumaj kondiĉoj por ĉasado, trinkas sian glaseton, metas zorge la kaptaĵon en la ĉasujon, kaj invitas min por vespermanĝo de la sekvonta tago. Dumvoje hejmen, parto de la pafita besto restas bone videbla. „Tio estas pro la aerumado,“ diras Aŝilo.

## La katastrofo

Iun antaŭtagmezon en aŭtuno, mi estis en mia ĝardeno, forigante falitajn foliojn. Subite Karlo staris antaŭ mi kun granda blanka malsovaĝa kuniklo en sia buŝego. Aŭtomate mi rigardis en la apudan ĝardenon. Mia antaŭsento estis ĝusta: Je mia hororo la pordeto de la kuniklejo estis malfermita, kaj Medardo estis for. La dorlotita kuniklo de mia najbarino pendis tie kiel ĉifono; la pelto estis tute malpura kvazaŭ la hundo trenis ĝin tra la freŝplugita kampo kaj la malseka herbo. Mi imagis jam grandan ĉagrenon, kiun Maria spertos, kiam ŝi revenos hejmen kaj vidos la katastrofon. Mi sciis, ke ŝi matene forveturis trajne al Willebroek por ĉeesti la enterigon de maljuna kuzo, kaj ke ŝi revenos posttagmeze. Kelkajn momentojn poste onklo Aŝilo alvenis fajfante gajan melodion. Ne komprenante li rigardis la scenon. Granda konfuzo superfortis lin kiam li aŭdis, ke la viktimo estas la molkore ŝatata kuniklo de la najbarino.

## La solvo

Post longa silento Aŝilo diris: „Kiel ni solvos tiun ĉi aferon?“, sed kolere mi respondis: „Ni? – Ne mi devas solvi tion: Estas via hundo, kiu faris la murdon. Do nur vi devas suferi pro tio. Feliĉe Maria ne estas hejme, sed je la kvara ŝi revenos, do mi esperas, ke tiam vi estos ĉi tie!“

Li profunde suspiris, atendis, pensis, suspiris denove, rigardis la mortintaĵon, ekzamenis ĝin atente, kaj konkludis: „Ĝi montras neniun vundon. Karlo certe ne mordis ĝin. mi pensas, ke ĝi mortis pro ektimo kiam ĝi vidis hundon.“ „Jes“, mi diris, „sed ĝi estas kiel ajn mortinta!“ „Por la kuniklo estas efektive egale“, li rezonadis, „sed ne por Maria. Mi estas konvinkita, ke ŝia ĉagreno estos multe pli granda pro murdo ol pro natura morto.“ Mi devas diri, ke li pravas; sed mi sentis, ke li havis planon elturniĝi. „Kion vi volas fari?“ mi demandis. „Nu, kiam ne estas murdo, ankaŭ ne estas murdinto. Do pri la hundo ne estas parolo. Sen hundo, la kuniklo estus ankoraŭ en sia ejo. Do ni purigos ĝin kaj remetos ĝin en la ejon. Maria trovos ĝin mortinta pro koratako, korafekcio, korvejnorompado, por mi estas tute egale; kaj ŝi estos kontenta, ke ŝia karulo ne estis viktimo de perforta morto, io kio tamen pli-malpli frue estus okazinta, ekzemple per buĉisttranĉilo.“

Mi ne povis diri ion kontraŭ tia rezonado. Krome, verdire ankaŭ por mi tio estis la plej bona solvo. Se Maria konus la veran okazaĵon, ankaŭ mi certe estus iom kulpa laŭ ŝia sento.

Do mi alportis vestbroson, kaj Aŝilo komencis la purigon. Tio estis pli facile dirita ol farita. Anstataŭ elveni el la felo, la cent mil sableroj entrudiĝis pli profunde inter la haroj. Malsekigi la broson ne utilis. Finfine Aŝilo iris en banĉambron kaj tenis Medardon sub la ŝprucigilo, sed la sableroj restis malcedemaj. Eĉ sapakvo kaj lesivaĵo ne helpis. Skuante subakvigi la beston tute en la bano estos eble la nura solvo; sed vane. La sablo restis necedema.

Helpe de mia harsekigilo ni klopodis sekigi la beston, kaj ni denove brosis la pelton. La situacio pligraviĝis videble. Pli kaj pli la bela Medardo eksimilis al iu

pikila besto anstataŭ al nature mortinta kuniklo. Kaj ĝi disvastigis penetran sapodoron. Lacegaj ni devis ĉesigi la provadon. Aŝilo eksidis, trinkis glason da brando, kaj pensis. Post kelkaj momentoj mi vidis malgrandan lumon en liaj okuloj. „Ĉu mi povas iun momenton havi vian biciklon?“ li demandis. „Por kio?“ mi volis scii. „Por veturi al Medardo Karpentero; li loĝas ĝuste malantaŭ la preĝejo de Nispen. Kutime li havas kuniklojn en diversaj aĝoj ĉar li mem bredas ilin.“ Kaj li forveturis. Dum lia foresto mi demandis al mi, ĉu estas hazarde, ke Maria nomis sian kuniklon Medardo; eble ŝi aĉetis ĝin ĉe tiu Medardo en Nispen.

Kiam Aŝilo revenis post dudek minutoj, mi estis konvinkita, ke la dua eblo estis la vero: La unua besto kiu vivanta vojaĝis en ĉasaĵujo de la onklo Aŝilo similis kiel du gutoj da akvo al la Medardo de Maria. Certe ili venis el la sama nesto. Aŝilo metis ĝin en la ejon; li kaŝis la kadavron sufiĉe profunde en sian ĉasaĵujon, kaj reiris hejmen, dirante: „Venu morgaŭ vespere por manĝi malsovaĝan kuniklon!“

## 5. La surprizo

Mi pensis, ke la problemo estas solvita. Sed mi miskalkulis. Konsiderinte la revenon de Maria, mi estis je la kvara en mia ĝardeno. Mi volis vidi, ĉu ŝi rimarkos la interŝanĝon. Kiam ŝi venis en sian ĝardenon, ŝi eligis laŭtan krion, alkroĉiĝis al arbo, kaj ekkriis: „Kiel tio estas ebla!!!“ Timigita mi demandis: „Kio okazis al vi?“ Konfuze ŝi montris al la kuniklo kaj diris: „Vidu tien! Hieraaŭ Medardo ne havis apetiton. Mi pensis, ke ĝi estas malsana. Hodiaŭ matene mi trovis ĝin mortinta en ĝia ejo. Mi ne havis sufiĉe da tempo por fari profundan kavon. Do provizore mi metis ĝin malantaŭ la baraketon kaj rapide ĵetis per ŝovelilo iom da sablo supren. Kaj nun ĝi sidas denove plenviva en sia ejo.“ Mi estis tute senvorta. „Venu kaj vidu,“ ŝi diris. Efektive, malantaŭe en ŝia ĝardeno oni vidis la lokon kie la hundo elfosis la kuniklon. Feliĉe Maria ne konas la diferencon inter hundaj kaj kuniklaj spuroj.

Mi tuj telefonis al onklo Aŝilo por komuniki al li la neatenditan turniĝon. Neniam mi aŭdis lin tiel energie blasfemi lin: „Kaj mi pagis kvarcent kvindek frankojn por tiu bestaĉo!“ li vekriis. „Ĉu mi rakontu la veron al Maria?“ mi demandis. „Ne, mi petas, silentu. Neniu devas scii ion pri tiu ridinda afero“, li kriis. „Kaj la festo kun malsovaĝa kuniklo ne okazos; mi ne manĝos viandon de tiu malsana besto.“

Post duona horo mi volis informiĝi, ĉu Maria jam rekvietiĝis de la emocio. „La nura klarigo por mi estas,“ ŝi diris, „ke Medardo dum kelkaj horoj estis ŝajnmortinta.“ „Jes“, mi respondis konvinke „tio ankaŭ okazas ĉe homoj“. „Sed mi ne komprenas“ ŝi pripensante diris, „kiamaniere ĝi povis refermi la pordeton de sia ejo.“

Denove mi estis senparola.

## Ne tiel, sed tiel ĉi!

F.Faulhaber

Broŝurservo de SAT Esperanto – Laŭte!  
FR-47470 Beauville  
2005

Preskaŭ ĉiuj spertis, ke iuj libroj kaj artikoloj legiĝas facile, la aliaj malpli facile.

Ni ĉiuj deziras havi facilan kaj elegantan stilon, tial F.Faulhaber volas helpi al ni per siaj konsiloj en ĉi tiu libro.

Estante ano de la Akademio, ano de la Literatura Komitato de SAT kaj recenzanto por pluraj Esp-gazetoj, Faulhaber devis kritike legi multajn Esp-verkojn. Li notis abundon da kritikindaj frazoj kaj esprimoj. Li prezentas ilin en ĉi tiu libro, aldonante iliajn preferindajn formojn.

Kun granda ĝuo vi legos, komprenos, admiros kaj imitos. Tiel ankaŭ vi iom post iom fariĝos bona stilisto.

La enkondukon de la libro verkis s-ino E. Burgler-Jezso, redaktorino de „La praktiko“.

### Kio estas stilo?

La vorto *stilo* devenas de la latina *stilus*, la skribilo de la antikvaj romanoj: bastoneto, kiu havis ĉe unu ekstremo pinton, ĉe la alia plataĵon. Per la pinto ili skribis, kion ili volis memori, sur tabuleton, kovritan per vakso, kaj per la plataĵo ili glatigis la vakson, kiam ili ne plu bezonis la notaĵon aŭ volis fari en ĝi ŝanĝon.

La nomon *stilus* ili rilatigis ankaŭ kun la skribitaĵo kaj tiam ĝi signifis *skribmanieron*, kaj en tiu signifo ni konas nun la vorton *stilo*. Komparu ĝin ekzemple kun la vorto *plumo* uzata en simila senco, kaj tiu antaŭe signifis nur „tubeto kun lanugo, el kiuj konsistas la kovraĵo de la korpo de l' birdoj (Kabe: Vortaro de Esperanto)“. El anserplumo oni faris ilon por skribi, fendante kaj pintigante ĝin per tiucela tranĉileto, kaj tiam la vorto *plumo* ricevis ankaŭ la signifon *skribilo*. Poste oni faris skribilon el ŝtalo, sed la nomo *plumo* restis. Kaj nuntempe ni konas eĉ *fontplumon*!

El la uzado de plumo-por-skribado estiĝis kelkaj esprimoj, ekz. pri iu, kiu skribas amare, ni diras, ke „li trempis sian plumon en galon“; kiu skribas akre, „havas akran plumon“, kaj kiu verkas bonstile, „havas plumon bone tranĉitan“.

Simile vastiĝis la signifo de la vorto *stilo*: la *skribilo* iĝis ankaŭ la *skribmaniero*. En tiu signifo *stilo* povas havi diversajn ecojn: ĝi povas esti bela aŭ malbela, konciza aŭ malkonciza, simpla aŭ malsimpla, flua aŭ rigida, eleganta aŭ vulgara, peza aŭ malpeza, ktp. laŭ la maniero, en kiu oni sin esprimas. Ekzistas ankaŭ pure persona stilo, per kiu la aŭtoro distingiĝas de aliaj aŭtoroj. Laŭ tia stilo oni eĉ povas rekoni la verkinton.

Ankaŭ diversaj temoj havas sian propran stilon. En tiu senco ni konas stilon ofican, komercan, juran, predikan aŭ „katedralan“. Propra stilo havas, fine ĉiu lingvo, nome ĝeneralan esprimmanieron, vortordon, frazkonstruon kaj spriton, kiuj kune formas la kanvason, sur kiu oni brodas la personan, la fakan kaj la okazajn stilojn.

### **Bona stilo estas simpla**

Por atingi klarecon oni aranĝu siajn frazojn en logika sinsekvo kaj evitu ĉirkaŭvojn, detalecon kaj senutilan balaston. Sed aliflanke oni evitu ankaŭ troan koncizon, kiu ofte starigas la leganton antaŭ enigmoj. Klarigu tion kelkaj ekzemploj:

La kunmetaĵoj: vaporŝipo, abonpago, rapidvagonaro, bonkora, scivola, altranga, bondeziroj, voĉdoni, piediri, estas jam komune uzataj kaj pro tio tute klaraj. Sed legante la vorton *diadoro* ni haltas: ĝi ŝajnas esti neologismo, sed vane ni serĉas ĝin en Plena Vortaro. El la enhavo de la verko, en kiu ni trovis ĝin, evidentiĝis, ke ĝi estas vorto kunmetita el *di-* kaj *adoro* = adoro al dio. Sed skribante *di-adoro* aŭ *adoro al dio* ni faras la vorton tuj travidebla.

La vorto *mesmistero* estas same malklara. Laŭ la verko portanta tiun titolon, ni komprenis, ke ĝi signifas *mistero de la meso*. La traduko *mistero de la meso* estas pli klara kaj pli belsona. Ĉe eventuala ripeto povas sufiĉi *mes-mistero* aŭ *mesmistero*, ĉar tiam la ideo estas al la leganto jam konata.

En la Esperanto-literaturo oni renkontas plurajn ne tuj kompreneblajn kaj tro longajn kunmetaĵojn. Ili dankas sian naskiĝon al la naciaj lingvoj, kiuj havas por tiuj ideoj nur unu vorton – kunmetitan aŭ ne- kiun la aŭtoro aŭ tradukinto volis nepre esprimi same per unu vorto.

Disigo de la kunmetitaj partoj, aŭ streketo inter ili, povas fari tiujn vortojn pli flue kompreneblaj.

Ju pli simple ni esprimas nin, des pli facile oni nin komprenas. Frazo, kiun oni devas relegi por kompreni ĝin, ne estas bonstila, ĉar bona stilo neniam ĝenas la legadon, sed male, ĝin faciligas.

Malbonan stilon oni renkontas pli ofte en tradukoj ol en originaloj. Tio estas evidenta, ĉar en originalo oni inklinas al plej simpla esprimo de la pensoj, sed dum tradukado oni spertas la influon de la originala teksto. La tradukanto ja volas sekvi la originalon kiel eble plej precize.



## Pri la libro „Ĉeĥa kuracisto en koro de Afriko“

La libro estas traduko de ĉeĥa lingvo el la jaro 2006. Ĝin verkis mem ĉeĥa doktoro Marcel Drlík, kiu volontule laboris en Centra Afrika Respubliko kaj eldonis ĝin per subteno de Ordeno de Nudpiedaj Karmelanoj de Jesu-Infano de Prago, en praga eldonejo Aventinum. Pri traduko meritas grupo de esperantistoj el Katolika Unuiĝo Esperantista en Ĉeĥio. La enspezo je la libro etos dediĉita por subteno de afrikanoj. Vi povas peti la libron sur adreso de Katolika sekcio de Ĉeĥa-Esperanto Asocio msvacek@iol.cz. La libro estas ilustrita kaj enhavas multe da fotoj de la aŭtoro.

Jen tre mallonga parto:

Vespere mi revenis misiejon tute labor-elĉerpita. Estis tio tre peniga tago. Ne nur ke ni en ambulatorio kun Tiziano diagnozis kelkdekojn da pacientoj, sed ni ankaŭ devis realigi kuracistan viziton de lia „sekcio“. Mi vidis vicon de kazoj, kiujn mi en Eŭropo ankoraŭ neniam renkontis, ekzemple virinon kun aidoso, trafitan per zostero, sed kiu ne nur trafis parton de la haŭto kiel kutime, sed rekte la tutan korpon; viron kun tuberkulozo afekciinta ne nur pulmon, sed ankaŭ la ventron; alian viron kun mukozo, kiu tute trakreskis liajn krurojn. En tiu ĉi forgesita parto de la mondo mi ĉirkaŭe vidis tiom da mizero kaj la homa sufero!

Mi sentis min ne nur treege lacigita, sed ankaŭ kiel granda stultulo. La hodiaŭa tago multe forprenis el mia memfido. Mi devas ankoraŭ multe lerni, por ke mi estu laborutila por Tiziano. Antaŭĉie mi devas komenci per la lingvo.

„Tiziano, mi aŭdis, ke vi instruas ‘sango’-lingvon“, mi esplordemandas antaŭ vespermanĝo. „Jam mi iujn fraŭlinojn instruis“, li allasas. „Kompreneble ankaŭ vi tion bezonus“, li ekridetas kuraĝige, kiam li vidas mian lacigitan kaj ĉagrenitan vizaĝon. „Do alvenu post vespermanĝo kuirejon kaj kunprenu biblion.“ Mi ne komprenas tion. Kial biblion? En difinita tempo mi alvenas en destinita loko kaj alportas, laŭ deziro de Tiziano malgrandan ĉeĥlingvan biblion en poŝforma versio. Tiziano jam atendas min. Sur tablo jam kuŝas preparita libro. Ĝi estas ankaŭ la biblio, sed presita en ‘sango’. Jam ĉio komencas por mi esti klare. Ekzistas neniuj lernolibroj en ‘sango’ en la franca lingvo, des pli ne en la lingvo ĉeĥa. Unusole, kion oni povas trovi, estas la vortaroj ‘sango’-francaj, eldonitaj plejparte ankoraŭ en la tempo de la kolonizado, aŭ malgrandaj kajeretoj en ‘sango’-lingvo kun la plej oftaj frazoj, presitaj memhelpe fare de misiistoj.

Tiziano malfermis hazarde sian biblion sur la komenco de la evangelio laŭ Luko. Ni komencas legi unuajn frazojn. Danke al ĉeĥa traduko mi detale komprenas ilian sencon. Tago post tago ni analizas unuopajn frazojn, ilian sintakson kaj signifon de ĉiu vorto. Tizianon mi ankaŭ petas traduki kuracistajn demandojn kaj instrukciojn. Iom-post-iome mi komencas kompreni logikon de la lingvo kaj post iom da tempo mi estas kapabla formi simplajn frazojn, mi ekscias, ke gramatiko de tiu indiĝena lingvo ne estas tro komplika. La

substantivojn oni ne deklinacias, la verbojn ne konjugacias, oni simple nur envicigas la unuopajn vortojn sinsekve unu post la alia. Se oni ekzemple volas diri: „Morgaŭ vi iros al bazaro“, oni diras: „Kekereke mo ga na gala“, kio en ŝango lingvo signifas: „Morgaŭ vi iri al bazaro“. Sed problemo estas la vortoj, kiuj havas pli da signifoj. Ekzemple se mi uzos esprimon „bi“ sur loko de substantivo, signifas tio „nokto“, sed se mi ĝin metos anstataŭ la verbo, la vorto ricevas signifon „ĵeti“. Tiujn ĉi mallongajn multsignifajn vortojn enhavas la ŝango multajn, kaj estas tasko de la aŭskultanto atente sekvi vortordon en la frazo, alikaze la frazosencon li neniam komprenos. La situacion aldone komplikas tiuj vortoj, kiujn oni povas prononci diference. Ekzemple „wala – labori“ oni povas ankaŭ prononci kiel „wara“, sen ŝanĝo de la vortsignifo.

El mia sperto mi kuraĝas diri, ke la ŝango apartenas inter la lingvoj pli simplaj, sed ellerni tiun lingvon estas komence ankaŭ sufiĉe malfacile.

La sekvaj tagoj travivantaj en Niem apartenis inter miajn la plej malfacilajn momentojn de mia restado en Afriko. Ĉiutage mi luktis kun nekonata lingvo, kuracis malsanojn, kiujn mi neniam antaŭ vidis, al kutimiĝadis al senfortiga tagvarmeo kaj nokta malvarmo kaj iom-post-iome mi al kutimiĝadis al vivo en misiejo kaj nova nutraĵo. Malgraŭ tio, ke mi ne estis dependa je indiĝenaj manĝoj, la modesta kaj simpla itala menuo estis tamen malproksime de ĉeĥa kuirmaniero. Ĉar patro Tiziano estis de la mateno ĝis vespero tute okupita kaj por la kuirado jam ne restis tempo, alvenadis al misiejo unu nigrulino el vilaĝo, kiu ĉiam preparis ion por manĝi. Temis tute pri neniu profesia kuiristino, do ĉiutage estis pli malpli la sama manĝo – legoma supo kaj kuiritaj pastaĵoj, kiel duonprodukto por la italaj misiistoj, importitaj dufoje en jaro el Eŭropo. Mi pensas, ke eble neniu vera italo povus sen ili vivi.

## **Pri Japanio**

**La Universala Kongreso de Esperantistoj okazis en Japanio...**  
do utilis kelkaj vortoj pri Japanio...

Ĝis la jaro 1853 estis Japanio tute fermita socio. Sed en tiu ĉi jaro alordiĝis en golfo proksime de Tokio, kiu en tiu tempo nomiĝis Edo, komodoro de usona maristaro Matthew Perry kun ses ŝipoj kaj kun prezidenta ordono: malfermi la landon por usona komerco.

Perry sukcesis transdoni al japanoj etuon kun usonaj postuloj kaj promesis reveni post unu jaro. Kaj tion en la jaro 1854 plenumis. Usonanoj alportis multajn donacojn: al ĉiu registara oficisto ili dediĉis dudek botelojn da viskio kaj por imperiestro plu modelon de vaporlokomotivo. Japanoj reciproke prezentis batalon „Sumo“. Kaj finfine, post ia implikado, japanoj subskribis la

interkonseton pri reciproka amikeco kaj promesis malfermi por komerco du japanajn ŝiphavenojn.

Tiamaniere komencis kunpuŝigo de du civilizoj, en kiu venkis flanko, kiu posedis „grandajn nigrajn ŝipojn“.

## **Malnova legendo**

**Pavla Zemanová, Ĉeĥio**

Diras unu malnova indiana legendo: prenu en viajn manojn globon.  
Karesu ĝin kaj babilu kun ĝi, ĝi ravigos vin – la indianoj konas ĝin.

Se vi vekus la globon el eterna dormo, vi eksentos efikon de vento.  
Flugu kun ĉi tiu energio, kiu en la ŝtono loĝas,  
kaj kiu iras el ĝia koro kaj vi la energion sentas.

Ruĝa ero da sablo interne estas kaŝita,  
en hematito, kiu havas brilan koloron ĝi estas kovrita.  
La sablo estas interne kaj ekstere estas kvarco kaj feroj.  
Ĉi tiu pramalnova globo estas honorata de Dioj.

Ero da sablo eble anstataŭigas ardan magmon,  
la hematito portas en si tondrojn kaj ŝtormon.  
Globo anstataŭigas nian Teron, kaj fererco diras: Ni havas koron!  
La ŝamano diras: Se vi havas dolorojn kaj vi estas malforta,  
loku la globon sur lokon, kie via doloro estas plej granda.

Aŭ ĉu vi bezonas ekkoni lokon, kiu estas kaŝita en tempo,  
petu la globon, ĉu ĝi iros kun vi reen kontraŭ tempo.  
Moqui estas bona amiko, kiu foriris por ĉiam dormi en monton,  
tion diras indianoj, kiuj donis al mi ĉi tiun mesaĝon.  
Moqui Marbles estas malnova indiana nomo por globa ŝtono.

La legendo diras, ke vi trovos en ĝi harmonion kaj forton...

## **Kiel mi Malkovris Esperanton**

Iu tago, kiam mi estis 20-jara, dum mia pliaĝa frato legis la ĵurnalon, li komentis: "Morgaŭ estos senpaga prelego pri Esperanto en la urbocentro. Ĉu vi volas iri?"

Mi ĉiam sciis ke "Esperanto" estis la "internacia lingvo" ... kaj mi estis bonŝanca ĉar neniu iam demandis pli pri tiu temo, ĉar mi sciis nenion plu. Mi komprenis ke ĉi tiu estos bona okazo por lerni iomete pli pri Esperanto, kaj mi respondis "Jes".

La sekvonta tago ni iris al la urbocentro ... per malsamaj vojoj. Li promesis renkonti min ĉe la prelego, sed mi ne vidis lin tie.

La preleganto parolis dum 45 minutoj pri Esperanto, ĝia deveno, ĝia celo, ĝiaj parolantoj. La sekvontaj 30 minutoj li parolis nur en Esperanto, per bone elektita vortprovizo. Ni ĉiuj komprenis lin, kaj eĉ respondis kelkajn el liaj demandoj en Esperanto. Mi multe ŝatis kion mi aŭdis tie. Sekve mi faris ... nenion.

Du semajnoj poste mi devis iri al la publika biblioteko. Mi prunteprenis 3 librojn kaj foriris. Kiam mi jam estis for de la konstruaĵo, mi memoris pri Esperanto. Mi reiris en la bibliotekon, trovis lernolibron pri Esperanto, kaj mi iris hejme. Tiu lernolibro restis sur breto.

La sekvonta semajno mi iĝis bonŝanca: mi malsaniĝis. Mi restis dum du tagoj en la lito. Kiam mi vekiĝis tiu mateno, mi ne sentis min bone. Mi restis en la lito, kaj mi vidis la lernolibron. Mi povis fari nenion alian. Mi komencis legi ĝin. Mi ne povis halti. Mi finis la libron dum tiuj du tagoj. Mi supozas ke mi legis iomete pli ol 20 horoj. Post tiuj du tagoj, mi jam konis la strukturon de Esperanto, kaj mi povis legi kaj kompreni ĉiujn legaĵojn en la lernolibro.

Enrique, [eenrike@gmail.com](mailto:eenrike@gmail.com)

## Sklerosis multiplex – disŝutita sklerozo

Temas pri malsano de centra nerva sistemo – cerbo kaj mjelo. Kialo ne estas konata, do oni ne povas la malsanon preventi. Ĝis nun oni ne trovis medikamenton, kiu povus la malsanon kuraci. La malsano atakas homojn plej ofte inter 20-40 jaraĝo de vivo. Aperas malfunkcio de nerva sistemo – la paciento ekzemple portempe blindiĝas, unu kruro aŭ duono de korpo ekparaliziĝas, homo perdas ekvilibron...

Laŭ esploroj plej ofte aperas la malsano en Ĉeĥa respubliko en norda parto de la lando. Eble tio kongruas kun malfavora vivmedio en tiu regiono. Virinoj pli ofte malsaniĝas ol viroj. Se familiano malsaniĝas, aliaj familianoj havas riskon 1:100 – 1:50, ke ili ankaŭ malsaniĝos. La nombro de la malsanuloj en nia respubliko superas 13.000 personojn.

La malsanon bremsas „interferonoj“ kaj „glatirameracetatoj“.

Pli da informoj [www.klubsms.cz](http://www.klubsms.cz), [www.ereska.cz](http://www.ereska.cz), [www.aktivnizivot.cz](http://www.aktivnizivot.cz)

Majka Chvátalová rakontas:

Mi malsanas jam dek ses jarojn. Kuracistoj starigis diagnozon antaŭ naŭ jaroj. Dum tiu tempo mi havis jam du infanojn kaj laboris en gastejo kiel mastrino. Post atakoj de la malsano mi malbone vidis, kaj mia kruro parte paraliziĝis. Mi alterne vizitadis okuliston kaj ortopediston, sed neniu sciis helpon. Fine mi kolapsis kaj la diagnozo manifestiĝis. La familio ŝokiĝis, ĉefe infanoj, sed feliĉe mia edzo subtenis min per sia konduto kaj „nigra humuro“. Ne ĉiam tio okazadas! Ofte familianoj estas ŝokitaj kaj nervozas pli ol malsanuloj kaj okazas, ke edzoj forlasas la familion.

Plej malbone mi sentas min matene. Preskaŭ pli ol duono da horo mi ne povas ellitiĝi. Por mia filino estas malfacile gvidi min al necesejo... Post iom da tempo mi komencas paŝi. Malfacile mi matene eliras per bastonoj eksteren, vespere mi revenas kaj la bastonojn mi ne bezonas. Homoj, kiuj ne konas min, pensas eble, ke mi estas frenezulino. Tia malsanulo venas al aŭtobuso sur ĉareto, poste stariĝas kaj portas ĉareton en la aŭtobuson kaj sidiĝas sur seĝon. Kiu ne konas la malsanon, ne komprenas...

De tempo al tempo dum tago venas la atakoj – la kruro ne funkcias, la okuloj ne vidas. Neniam mi scias kio okazos matene, aŭ post momento. Ekzemple mi ludas kun infanoj sur herbejo kaj subite mi falas teren kaj mia edzo portas min hejmen. Vespere oni ekdormas kaj oni ne scias kio okazos venontan tagon.

Ĉian monaton mi organizas kunvenon de same malsanaj homoj. Tie oni vidas, kiel la malsano malsame progresas. Oni ne trovas du samajn evoluojn de la malsano. Iu sentas sin bone, alia eĉ mem ne povas enigi kuleron en buŝon. Sed io estas komuna: kiu ĉesas barakti – havas finon proksime. La ĉefan rolon ludas psiko. Mi scias, se mi ĉesus barakti kaj falus en deprimon, ke mi dum tri jaroj restos sur ĉaro por invalidoj.



Tomáš Hrabánek rakontas:

Kiam mi eksciis, ke mi estas malsana, mi decidis vivi plene kaj libere. Mi vizitadis koncertojn, ekspoziciojn, ĉion kio Prago ofertis. Mi ekskursis, boatis. Mi volis pruvi, ke ankoraŭ mi iel sukcesos. Mi akceptis postenon de fabrika direktoro kun 200 laborantoj. Sed venis atako kaj mi ne scipovis eliri domon dum kvin monatoj. Mi havis filon duonjara kaj mia edzino prizorgis nin ambaŭ. Mi vere penis esti movebla kaj en ordo, sed en la fabrikon mi ne revenis. Nun mi kun amiko entreprenas kiel investaj konsultantoj. Tio estas por mi kaj mia malsano adekvata laboro, ja mi estas universitate klera kaj loĝas en Prago. Post la lasta forta atako mi prenas medikamenton Copaxone, kiu malfortigas la atakojn kaj mildigas miajn problemojn. Antaŭe la malsano signifis, ke ĝis kvin jaroj mi restos sur invalida ĉareto. La novaj medikamentoj helpas, sed ankaŭ efikas deprimon kaj iuj malsanuloj inklinas al memmortigo. La homo iam estas tiel lacega, ke ekdormas dum neĝisdirita frazo, matene estas tiel malfacile ellitiĝi, sur strato li falas, terure timas kio okazos morgaŭ, konstante li devas zorgi pri si kaj povas kiam ajn blindiĝi... La malsano estas stranga kaj sana homo povas nur malfacile ĝin kompreni...

Lenka Matoušková rakontas:

Mia malsano komenciĝis antaŭ kvin jaroj. Mi estis instruistino de ĉeĥa lingvo kaj korpa edukado en baza lernejo. Mi estis dudek kvin jarojn aĝa kaj freŝa edzino.

En nokto mi vekiĝis kaj soifis. Mi volis verŝi akvon, sed la glason mi lasis fali el mano. Mi pensis, ke temas pri nenio grava kaj mi iris en lernejon. Sed tie mia stato malboniĝis. Mi ne sukcesis klare paroli, mi ne kapablis teni plumon. Je la venonta tago mi iris denove al lernejo, sed mi perdis ekvilibron kaj paŝis kiel ebriulo. Mi iris al praktika kuracisto. Tiu jam suspektis la malsanon kaj tuj direktigis min en hospitalon. La gepatroj kaj mia edzo eksciis pri la malsano, sed oni diris al mi nenion. Hazarde mi legis kuracistan raporton, kiun mi trovis en mansako de mia patrino. Mi ne komprenis, kial mi estas malsana? Mi nenion fifaris, mi ne kulpas!!

Mi ŝatis instrui, sed mi devis forlasi lernejon. La malsano homon danĝerigas. Kiam mi havis nazkataron, mi preskaŭ blindiĝis je unu okulo. Mi multe ploris. Mi esperis, ke la medicino progresos, aperos novaj medikamentoj kaj mi eble revenos al mia ŝatata profesio.

La aferon ni kun edzo decidis tiel, ke ni vendis nian familian domon kaj ŝanĝis loĝlokon en Pragon, pli proksime al kuracistoj. Hejme mi private instruas kelkajn studentojn kaj mem mi komencis studi psikologion kaj poste en altlernejo ankaŭ andragogikon – edukado de maturaj homoj. Mi agas por Asocio de Junaj Malsanuloj. Mi akceptas mian malsanon kiel defio kaj esperas sukceson.

Petra Keřková rakontas:

Antaŭ nelonge mi edziniĝis. Mi estas dudek ses jarojn aĝa. Mi ankoraŭ studas informadikon kaj bibliotekan fakon kaj samtempe mi laboras en biblioteko kaj havas postenon de sekretariino. La malsano atakis min post klopodo dum ekzamenoj kaj post grava longa gripo. Subite al mi paralizigis duono de korpo, kvazaŭ mordus miajn piedojn formikoj kaj la dekstra mano ne funkciis.

Antaŭe oni ne rekomendis al junulinoj kun nia diagnozo gravedon, sed nun, kiam funkcias kuracista zorgo, la gravedo eĉ favoras. Mi estas nur ĉe komenco de la barakto, sed kiam mi vidas homojn ĉirkaŭ mi, kiuj baraktas jam dum jaroj, mi trovas forton barakti kiel ili.

### **Laŭ materialoj de Libuška Trojanová**

tradukis J.Drahotová.

## **Teorio de relativeco**

### **Prelego okaze de internacia jaro de fiziko 2005**

Skokovy, Ĉeĥa paradizo, Ĉeĥio.

Prof. Albert Einstein (14.3.1889, Ulm, Germanio – 18.4.1955, Princeton, Usono) en la jaro 1905 publikigis tri artikolojn, kiuj kaŭzis revolucion en fiziko:

1. Progreso de statistika fiziko, antaŭdiro de moviĝo de Brown (la plej citata artikolo)
2. Naskiĝo de tiel nomata kvantuma mekaniko (Nobelpremio en la jaro 1921)
3. Specifa teorio de relativeco (la plej konata kontribuo de A.Einstein)

*relativeco* – kion oni vidas, **dependas** de la loko de kiu oni observas objekton, do la homoj (observantoj) vidas samajn aĵojn diverse.

*absoluteco* - ... **ne dependas**... , ĉiam la sama rezulto



Kiam sesjara Albert Einstein ricevis kompason, li ludis kun ĝi. Estis por li tre interesa fenomeno, ke magneta nadlo influigas sen materia kontakto. Li ekinteresiĝis pri elektromagnetaj fenomenoj kaj post iu tempo li trovis kelkajn gravajn problemojn kaj demandojn:

*Kiam mi movigos magneton, ĉu la nadlo reagos samtempe, aŭ pli poste?*

Imagu, ke mi vidas min en spegulo, kiun mi kunportas, sed kiam mi moviĝas same rapide kiel lumo, ĉu mi vidus min en la spegulo plu, aŭ ne, ĉar lumo neniam atingus la spegulon?

Albert multe parolis kun siaj amikoj kaj serĉis respondojn por tiuj ĉi demandoj. Post kelkaj jaroj li respondis al si mem.

Li konsciis pri la principo de relativeco de Galileo Galilei. Tiu principo diras, ke per neniu mekanika eksperimento aŭ mezurado oni ne povas destini, kiel rapide oni moviĝas. Albert Einstein nur ĝeneraligis tiun ĉi ideon: Per neniu eksperimento oni povas mezuri rapidecon de propra moviĝo, ĉar en ĉiuj sistemoj (por ĉiuj observantoj), kiuj moviĝas (aŭ ne moviĝas) kaj ne ŝanĝas sian rapidecon, ĉiuj eksperimentoj havos tute saman rezulton maldependan de propra rapideco. Ĉiuj sistemoj estas egalrajtaj, neniu sistemo havas privilegion (ekzemple kiel etero). Ĉiuj tiuj eksperimentoj diras la saman ideon, kiu nomiĝas **specifa principo de relativeco**. Bv. legi ĉion denove kaj respondi rilatajn problemojn.

Ne ekzistas absoluta sistemo (etero). Se oni moviĝus kun spegulo same rapide kiel lumo, oni vidus sin en la spegulo plu (alie oni destinus, ke oni moviĝas lumrapide, kio ne eblas pro la principo de relativeco)! Tial ankaŭ oni ne povas mezuri rapidecon de nia planedo rilate al etero per eksperimento de Michelson (ĉar etero ne ekzistas).

Albert Einstein sukcesis respondi kelkajn problemojn uzinte *fundamentan principon!* Ĉu iu principo helpas al ni respondi pluajn problemojn?

*Ĉu rapideco de disvastiĝo de signalo/informo estas limitita?*

Se ne, tio rezultus, ke konsekvenco povus antaŭi propran kaŭzon, kaj tio ne eblas. (Imagu, ke lampo eklumigus pli frue ol iu ŝaltus ĝin!) Do devas ekzisti limito por rapideco de disvastiĝo de iu ajn informo aŭ signalo, alie tiel nomata **principo de kaŭzeco** povus esti rompita. La plej granda konata rapideco estas la lumrapideco (300 000 km/s).

Tiu grava rapideco, la lumrapideco, devas esti la sama por ĉiu sistemo, ĉar tio estas la limitrapideco por ĉiu moviĝo! Do ni parolas pri relativeco de moviĝo, sed **lumrapida moviĝo estas ABSOLUTA !**

Kelkaj fundamentaj rezultoj de la specifa teorio de relativeco de Albert Einstein estas:

- \* mallongiĝo de longeco (moviĝanta objekto ŝajnas esti pli mallonga en direkto de moviĝo)
- \* malrapidiĝo de tempo (por moviĝanta objekto ĝia propra tempo kuras pli malrapide ol nia tempo)
- \* relativeco de samtempo kaj samloko (du eventoj, kiuj ne estas kaŭzo kaj konsekvenco kaj kiuj okazis samtempe/samloke por iu observanto, NE estas samtempaj/samlokaj por alia observanto, kiu moviĝas rilate al/de ni)

*Ni ne povas normale observi tiujn fenomenojn, ĉar oni povus observi ilin nur dum preskaŭ lumrapideco.*

Pavel Bröm  
Stelobservejo Mladá Boleslav, Ĉeĥio  
[brpav@seznam.cz](mailto:brpav@seznam.cz)

## **El populara ĉeĥa gazeto KVĚTY**

20/2006-02-02 paĝo 50  
28,00 CZK

### **Ĉu vi jam gustumis kamelaĵon?**

La kamela lakto jam baldaŭ furoros. Ĝi havas tri foje pli da vitaminoj C kaj B, ol la bovina! Ĝi enhavas pli da fero kaj kalcio kaj malpli da graso.

Restas ankoraŭ problemoj, ĉar kamelinoj donas nur 5 litroj da lakto potage kaj kontraŭ la bovinoj nur kiam ili mem volas. Tamen bredistoj en Azio kaj Afriko kredas, ke oni la problemojn solvos kaj merkato per kamela lakto disvastiĝos. Oni prognozas ke en mondo oni vendos je pli ol 1,5 miliardoj da Eŭroj.

Francoj jam komencis provi fabriki fromaĝon „Camelbert“, kaj entreprenisto en Vieno Johann Hochleitner havas planon kiel lanĉi fabrikadon de kamellakta ĉokolado.

### **Helpu! Ursoj dronas!**

Arktaj ursoj eble estas unuaj viktimoj de tutmonda plivarmiĝo de la Tero, ĉar arktikaj glacioj, kiujn la blankaj rabobestoj bezonas por ilia vivo, iom post iom perdiĝas.

La ursoj ripozas kaj ĉasas fokojn sur flosglacio. Kaj tiuj nun estas unu de la alia pli malproksimaj. Tial ursoj per longa naĝado laciĝas, perdas sian grason kaj rezistoforton. Iam eĉ tute elĉerpigas sian forton kaj dronas!

Laŭ fakuloj dum pasinta dekjaro malpliigis la nombro de ursoj en Arktiko je 14%. Nun vivas tie nur 950 ursoj.

## **El la libro „Sekreto de estonto“ de Dagmar Kludská**

Ŝi devenas el fama cirka familio Kludsky. Ŝi legas pri estonteco el kafa sedimento post eltrinko de kafo. Tian kafon la ĉeĥoj nomas „turka“. Pri la kafo ŝi skribas en unu de siaj multaj libroj:

La plej bela kafejo en Prago estas en kvartalo Smíchov „Kafejo Savoy“.

La plej malnova kafejo devenas el la jaro 1624. Ĝi estas en Venecio en Italujo – „Café Florián“. En Oksfordo oni lanĉis servi kafon en kafejo en la jaro 1650. Fama pariza kafejo funkcias de la jaro 1689.

La plej fama kafejo estis en strato Via Condotti – „Antico Caffé Greco“. Ĉi tie kunvenis personoj de arta mondo – germana poeto Goethe, itala pentristo Giorgie de Chirico, Renato Gottuso kaj aliaj. Nun la kafejo jam ne funkcias.

La plej grandaj konsumantoj de la kafo en Eŭropo estas finnoj, svedoj, danoj... ĉeĥa nacio estas en mezo de la listo kaj angloj estas la lastaj.

La plej grandan profiton el kafgrenoĵ verŝajne akiras agrikulturo en Ugando. En la jaro 1986 la profito enhavis 95% de ĉiuj valutaj enspezoj.

Eminenta komponisto Johann Sebastian Bach en la jaro 1729 verkis „Kafan kantaton“, ĝis nun konatan kaj ludatan.

Legendoj pri kafo.

Turkaj imamoj kulpigis kafon pri neglekto de kredantoj pri moskeo kaj preĝado.

Katolikaj pastroj opinis simile. Ili asertis serioze, ke kafo estas kaptilo por kristana animo.

Edzinoj de angloj plendis pri troa „sekeco“ de siaj edzoj, kaŭzita per kafo. La raporto ne priskribas pli detale pri tiu sekeco.

Al moderna homo ĝenas malheleco de dentoj post trinkado de kafo. Iuj asertas, ke kafo plialtigas sangopremon, aliaj laŭdas, ke ĝi altiĝas malaltan

sangopremon, triaj, ke ĝi subtenas funkciadon de koro, kvaraj atentigas, ke ĝi malfortiĝas funkciadon de koro kaj renoj, kaj aliaj, ke ĝi kaŭzas problemojn de intestoj kaj stomako... iajn, ke ĝi kuraĝigas – aliajn, ke ĝi lantigas... **sed oni trinkas ĝin.**

Kafarbustoj havas sian hejmon en suna Arabio, sed oni povas ilin planti ĉie, kie estas varma kaj malseka klimato, ekzemple en Brazilo, Kolombio, mezamerikaj respublikoj kaj en orienta Afriko.

La kafarbusto donos fruktojn nur post kvin jaroj de plantado kaj zorgado. Unu arbusto donas al la posedanto jare nur du kaj duono da kilogramoj da verdaj beroj, de kiuj post prilaborado oni akiras netutan duonon da kilogramo de kafgrenoj. Vi certe povas nun imagi, kiom da arbustoj oni devas planti, por ke ni povu trinki unu – du - tri tasojn da kafo tage.

Kiel longe la kafgrenoj estas freŝaj? Tiuj verdaj (nefrititaj) tenas sian kvaliton tre longe – onidire 8 – 10 jarojn. Sed post frito ili rapide perdas kvaliton kaj aromon. Do pripensu kian kvanton da kafo vi aĉetadu. Oni rekomendas teni kafon (dum ne tro longa tempo) en bone ŝtopita ujo kaj la plej bone en glaciŝranko.

Ekzistas pli ol cent specoj da kafo. Esence tamen estas nur du ĉefaj grupoj:

**kafo arabica** – kiu kreskas en varma kaj humida klimato. La plej delikataj specoj *santos* oni plantas en Brazilo en Pernambuco, Minas Gerais kaj São Paulo. Tiuj kafoj estas guste eminentaj. La grenoj estas plataj kaj longaj. Post rostado la koloro estas klare bruna kaj sulko de la greno kolore direktas al la griza.

**kafo robusta** – estas plantita en lokoj, kie la kafo arabica ne kapablas prosperi pro netaŭga klimato. La plej deziratajn specojn oni plantas en Afriko (Kongo) kaj sur malagasa insulo (Madagaskar). La grenoj enhavas eble dufoje pli da kofeino ol la arabica. La grenoj havas rondan formon kaj post rostado havas karakteran malhelan koloron. La gusto de la kafo robusta estas plimalpli amara.

La kafo, kiun ni aĉetas ĉe ni, ne enhavas nur specojn robustan aŭ arabican. Ĝi estas fake miksitaj de ambaŭ. Des pli la preparita kafo estas malhela kaj pli amara, ju pli da robustaj grenoj ĝi enhavas. Nur la plej multekostaj markoj de kafo enhavas neniajn robustajn grenojn.

Traduko  
J. Drahotová, Ĉeĥio

## El Právo – ĉeĥa tagĵurnalo (Rajto)

Je la 21-a de oktobro 2006 skribas Anna Bortlíčková:

### Atentigu brandon! konsilas gvidlibro al koreoj

Konsilantaro en moravia-silezia regiono en Ĉeĥujo eldonis por koreaj entreprenistoj kaj iliaj familioj gvidlibreton je 60 paĝoj en nombro 500 da ekzemploj. Sur la koverto oni povas legi: „Bonvenigu ĉe ni!“ Tekstoj kun fotoj estas en korea lingvo kaj devus helpi al koreanoj, kiu venas konstruigi fabrikon Hyundai Motor Manufacturing Czech en tiun ĉi regionon.

Nun koreoj eksciis, ke ne estas dece ĉe ni montri al homoj per montrofringro, spite tio en Koreio ne estas ofenda.

En gvidilo oni povas legi: „Oni konsideras dece, ke vi salutas envenante malgrandan butikon, restoracion aŭ atendejon, sed oni ne atendas, ke vi daŭrigos interparolon.“ Aŭ: „Ne estas dece demandi virinon pri ŝia aĝo.“ Aŭ oni atentigas pri invito al „buĉfesto“ kaj trinketado de ĉeĥa brando. „Kio estas tiu „buĉfesto“? „Se vi pli intime konatiĝus kun loka loĝantaro, oni povas vin inviti viziti festenon en hejmon. Tie buĉisto buĉos porkon kaj kun hejmanoj fabrikos diversajn viandajn specialaĵojn. En la gvidilo estas listo de tiuj specialaĵoj, ekzemple: „prdeláčka“ – supo - brogaĵo kun porka sango.“

„Malagrabla surprizo povas esti alia ĉeĥa specialaĵo: tiel nomata „turecká káva – turek“. Kafan pulvoron oni metas en tason kaj verŝas bolantan akvon. Se vi tian kafon ricevus, lasu post miksado la pulvoron kuŝigi sur fundon de taso kaj poste singarde trinketu.“

Plu oni povas legi konsilojn kiel aĉeti viandon, kie trovi kuraciston, kion fari okaze de perdo de bankkarto, kiel konduti kontraŭ malhonestaj ŝoforoj de taksioj...

Dosik Kim loĝas en ĉeĥa urbo Mošnov de julio. Unuan fojon li vizitis Ĉeĥion dum pasinta jaro en septembro. Li diras: „Mia unua ĉeĥa vorto estis „pivo“ – biero. Nun mi konas pli multe da vortoj. Ekzemple „bramborák“ – frititaj flanoj el krudaj terpomoj – mi ŝatas, ion similan ni kuiras hejme. Mi jam gustumis multajn ĉeĥajn manĝaĵojn kaj porka genueto preparita kradrostile estas por mi bonega. Mi vere ŝatas ĉeĥan bieron. Kelkfoje semajne mi kunvenas kun kelkaj ĉeĥaj amikoj por trinki ĝin kaj pro tio mi klopodas lerni la ĉeĥan, ke ni povu interbabili.“

Kim aldonis sur sian vizitkarton ĉeĥan baptonomon : Tomáš – Tomaso.

Koreoj mem konfesas: La plej granda problemo estas ĉeĥa lingvo. Sinjorino Jin Yeun Kim plendas: „La ĉeĥa estas insida kaj malfacila, sed por nia vivo ĉi tie bezona.“ Ŝi vivas en Ĉeĥio jam kvin jarojn. Pri ĉeĥoj ŝi opinias, ke ili estas amikuloj. Plaĉas al ŝi, kiel viroj malfermas pordojn por virinoj, laŭdas ilian ĝentilecon. Ŝi devis al kutimiĝi matene pli frue ellitiĝi, sed agrabla estas por ŝi

pli longa libertempo – kompare kun kutima unu semajno en Koreio. La gvidlibron ŝi konsideras tre bona.

## **Mary, edzino de dana kronprinco Frederik fuŝparolas la danan**

En Právo je la 20-a de oktobro 2006 skribas Vladimír Plesník:

Dana verkisto de fabeloj Hans Christian Andersen iam plendis, ke lia gepatra lingvo ne estas lingvo, sed grava malsano de gorĝo. Mary povus lian eldiron senskrupule subskribi.

Mary Donaldson (34) el aŭstralia Tasmanio komencis brile. Ŝi ekamis al Frederik (38) en la jaro 2000 en Sydney dum olimpiko kaj ŝokis danojn per kelkaj frazoj en la dana lingvo. Danoj konsentis kun admiro: „Ŝi vere amas lin!“ Ankaŭ Frederik ne kaŝis pasian amon al ŝi.

En la jaro 2004 okazis edziĝsolenaĵo en kopenhagena katedralo. Redaktoro de dana televido prikomentis la okazon: „Kronprinco edukita en tri specoj da armiloj estas senpova kontraŭ armilo de sia edzino – beleco. Li baraktis kun larmoj.“

Ilia amo daŭras. Sed la amo inter Mary kaj dana popolo? Unue oni parolis pri malmulta zorgo pri ŝtataj aferoj kaj karito. Poste venis riproĉoj al „ekstravagancoj“, ĉar ŝi en modaj gazetoj aperis kiel modelulino, ŝian vizaĝon oni rigardis sur supra paĝo de aŭstralia gazeto Vogue. Oni riproĉis al ŝi aĉetadon en Prado kaj Gucci, veturo per pompa Maserati... Pro antikvaĵoj ŝi pagas pli, ol plaĉas al danaj impostpagantoj.

Dum vizito de ĉeĥa Prago ŝi parolis brile, sed angle.

En septembro ŝi vizitis Pragon – vere juna damo, forta personeco, sindeteneco, nobleco... Ŝi estas la plej juna el 4 ambiciaj gefratoj, sed neniam la lasta. Ŝi studis juron kaj komercon en Sydney kaj tre bone sukcesis en reklamfirmao Young and Rubicam, kaj en Eŭropo en Microsoft. Dum olimpiko en Aŭstralio ŝi reprezentis Aŭstralion en jaĥtado.

Sed en Prago oni malkaŝis ŝian malfortecon, kiam ŝi en dana bakejo Mansson frandis danajn kuketojn. Ŝin trovis tie grupeto de danaj turistoj kaj post mallonga konversacio la turistoj ĝentile transiris al la angla kaj adiaŭdis rapide.

Princo Henrik – edzo de reĝino Margrethe ankaŭ ne sukcesas paroli la danan.

Bonaj rilatoj kun Mary kaj ĵurnalistaro ĉesis, kiam oni riproĉis al ŝi nenian progreson de ŝia lingvaĵo en la artikolo „Mary en lingva krizo“ – En raporto el aranĝo por omaĝo de kelkaj artistoj oni skribis: „Kvankan ŝi legis parolon,

preskaŭ neniu komprenis ŝin. Danan „ŭ“ ŝi esprimadis kiel nura komencantino. ... Se ŝi daŭros tiel, ŝi fariĝos la sama kiel princo Henrik (72).“

Henrik estas edzo de tre ŝatata, arte talenta kaj admirantino de cigaroj – reĝino Margrethe. Henrik – origine Henri Marie Jean André, grafo de Laborde de Monpezat, devenas el Francio kaj al Danio venis en la jaro 1967. Post preskaŭ 40 jaroj lin la popolo de lia edzino primokas, ĉar li ne sukcesis eklerni sufiĉe la danan lingvon.

Gazeto Extra Bladet rekomendis al li kaj Mary komunan intensan kurson de la lingvo kaj enketis legantaron ĉu pli bezonas tion Mary aŭ Henrik. Okdek procentoj indikis Henrik-on.

Traduko J.Drahotová

### **Mia instrulaboro kaj impresoj en Irano** (parteto)

Tereza Kapista, Serbio  
je la jaro 1382 laŭ irana kalendaro

La unua impreso, kiam mi eniris la lernoĉambron estis tiuj nigraj tukoj! Helas nur vizaĝoj! Poste mi ekvidis la brilantajn okulojn de tiuj belegaj knabinoj, ĉarmaj, scivolemaj, kiuj atente aŭskultis ĉiujn miajn vortojn. Mi sentis, ke ili simple suĉas per okuloj miajn vortojn kaj la okulbriladoj montris, ke ili vere sopiras scion. La kontakto estis tuja, sincera, elkora kaj reciproka. Ili simple ĝuis lecionojn. Mi ne sciis, ke en Irano la virinoj *ne rajtas kanti*, kaj mi kantigis ilin kaj ili supozante tion, ke la kantoj apartenas al la leciono, kantis, ĉiam pli laŭte kaj ĝoje.

Estis interesaj aferoj, kiam mi ekzemple instruis la tagojn de semajno kaj demandis: kiu tago estas la unua labortago en la semajno kaj la respondo estis: sabato. Kaj la festotago? Vendredo. Jes, en Irano estas tiel. Kiam ili lernis pri kalendaro, mi demandis la unuan tagon de la jaro kaj montriĝis, ke en Irano la unua tago de la jaro estas la 21-a de marto, la irana novjara tago – *No ruz*. Tiam ili servas manĝaĵon de specojn kies nomo nepre devas komenci per litero „s“. en tiu tago ankaŭ oni povas havi kolorigitajn ovojn (ni tion havas dum Pasko). En Irano ili havas same 12 monatojn, sed la unuaj 6 monatoj havas po 31 tagoj, la sekvaj 5 monatoj po 30 tagoj kaj la lasta po 29, foje po 30 tagoj. Sed ili ankaŭ konas la tiel nomatan eŭropan kalendaron. Ankaŭ en kalendaroj estas tiel nomata sunkalendaro kaj la monatoj ricevis nomojn de spiritaj estaĵoj pleje de gardanĝeloj, anĝeloj de montoj, riveroj, arbaroj, gardistoj de bestoj, kreskaĵoj, de fajro kaj mineraloj, de suno kaj la tero. Tio devenas el zoroastra religio kaj oni tion ĝis nun ne ŝanĝis.

En Irano multaj, precipe gejunuloj lernas la anglan. Tio estis mia feliĉo, ĉar mi ne devis perdi tempon instrui ilin skribi laŭ latina alfabeto. La persa

skribmaniero estas tute alia. Ili komencas skribi sur la lasta paĝo de la kajero kaj skribas de dekstre maldekstren. Do, kun literumado ni ne havis problemon. Ankaŭ surprizis min, ke ili ne havas problemon kun akuzativo pro tio, ĉar ili havas similan regulon. La korelativoj same facile estis lernitaj. La prononco estis vere bonega, nur foje ili anstataŭ „o“ prononcas „u“. en skribaj ekzercoj mi konstatis, ke ili nomojn ne skribas per majusklo, sed mi komprenis, ĉar en persa tio ne ekzistas. Mi miris, ke multaj el ili la hejmtaskon komencis: Je la nomo de Dio! Kvankam mi tion ne instruis. Eble pro religiaj kialoj, ĉiun komencon Dio devas beni. Korektante la hejmtaskojn mi konstatis, ke preskaŭ ĉiuj skribas preslitere ne kunligante la literojn. Do, mi montris kiel skribi kaj kunligi literojn. Mi multe desegnis sur tabulo, ĉar mi ne havis sufiĉajn ludilojn (esence en la Cseh-metodo, kiu prefere montras ol klarigi pervorte) kaj mi alportadis veran panon, fruktojn...

Interesaj estis ankaŭ la *falsaj amikoj*: **kie** en la irana signifas **kiu**. **Ke** estas same **ke**, samsignifa. **Ŝeŝ** en la irana estas **ses**, do tre simila al nia ses. Sed **kun** en la irana signifas **postaĵon**. **Se** en la irana signifas numeron **tri**...

Laŭ reguloj de Cheh-metodo mi instruas la vorton **hundo** kaj mi rimarkis ke ili iomete kun miro rigardis min, tamen ili ripetis kaj ellernis la frazon: **la hundo estas besto**. Poste mi eksciis, ke laŭ korano la hundo estas malŝatata kaj hundoj ne ekzistas en Irano. Ankaŭ katojn mi vidis nur en parkoj kie maljunulinoj nutras ilin. Nenia dorlot-besto rajtas vivi en la domoj kun la homoj. Irananoj obeas tiujn regulojn.

Sed pli ol 50 vortojn mi trovis, kiuj similas kaj preskaŭ samsonas kun la serba, pro tio ĉar multaj vortoj devenas el turka lingvo kaj la turkoj regis ĉirkaŭ 500 jarojn niajn landpartojn (Balkanon), kaj ni akceptis multajn turkismojn. Sed iu diris, ke eble la persaj vortoj influis la turkan lingvon. Kiu scias. Tamen ili ĝojis, kiam mi ion komprenis de ilia interparolo.

Post iom da tagoj mi konstatis, ke la afganinoj-rifuĝantoj ne rajtas frekventi regulajn ŝtatajn lernejojn kaj pro tio sopirante scion ili lernas ĉiujn eblajn kursojn: pri flegado de malsanuloj, pri komputilado, angla lingvo, kaligrafado, kelkaj manlaboroj ktp. do, ankaŭ Esperanton. Ili jam mem gvidas kursojn al aliaj pri komputilado! Sed menciinda estas ilia lernado de la angla. Tion oni povas fari en Irano en kvin ŝtupoj: La 1-a ŝtupo, se vi nur deziras lerni iomete paroli sen skribado kaj sen legado. La 2-a, se vi deziras ankaŭ lerni legi. La 3-a, se vi deziras kaj skribi kaj legi. La 4-a se vi lernas nur lingvaĵojn de iu fako kun skribado kaj legado, sed sen iu alia literatura scio. La 5-a estas la vera kurso kiel en Eŭropo, kiam vi lernas paroli, skribi kaj legi. Certe tio estas pro nescio de latinaj literoj, kaj instrui tion forprenas sufiĉe da tempo. Se iu estas ekzemple vendisto, sufiĉas ke li sciu nur iomete demandi pri la deziro de la aĉetanto sen skribado kaj legado.

Dum vespere kaj frue matene mi estis libera kaj rigardis televidan programon en mia ĉambro kaj kvankam ekzistas nur 5 kanaloj (ĉiuj iranaj), mi konstatis, ke ili havas utilajn programojn. Ekz. instruado de komputado.



Tion ili bone montras, ke mi sen scio de la lingvo preskaŭ povis ĉion sekvi. Ankaŭ ili bele prezentas kuirarton, ĉiam pri naciaj manĝaĵoj. Bonega estas ankaŭ la florkultivado kaj plantado de floroj. La elsendoj porinfanaj estas ĝuindaj. Mi vidis, ke knabinoj havas helbluajn kaptukojn. Rimarkeblas ke dum reklamoj pli da knaboj ol knabinoj ion reklamas. La ŝampuojn ĉiam reklamas nur viroj aŭ infanoj. Neniam finiĝis tago sen iu poeto, kiu recitas siajn poemojn en belegaj ĝardenoj, apud lagetoj aŭ surmonte. Do, ili pluen flegas la amon al poezio, kio jam estas kelkmiljara tradicio. Sed ankaŭ po tage 3-4 filmoj estas elsenditaj pri la milito inter Irako kaj Irano. Ĝi daŭris 8 jarojn, kaj finiĝis en la jaro 1988. Mi demandis kial? La respondo: Ni ne rajtas forgesi tion! Jes, tio veras, tamen ankaŭ bonas konduki homojn al paco kaj toleremo. Ne malfermadi jam la cikatrajn vundojn!

La libro oni povas akiri en la traduko al la ĉeĥa lingvo sur paĝoj:  
[www.bezvydavatele.cz](http://www.bezvydavatele.cz)

### **Pri libro „Ribelo de deprivitoj – monstroj, iloj kaj defendo“**

de František Koukolík kaj Jana Drtilová  
Vzpoura deprivantů

En edicio Makropulos en eldonejo Galén aperis nove prilaborita verko de fama MUDr. František Koukolík, DrSc. (1941) kaj de MUDr. Jana Drtilová (1940). El iliaj plumoj jam devenas libroj: La vivo kun deprivitoj, Malbono por ĉiutago, Fundamentoj de stupidologio, Alia infano. Sed publiko de Fr.Koukolík estas pli vasta, sole kaj kun aliaj fakuloj ekzemple: Cerbo kaj ĝia animo, Libro pri Adamo kaj Eva, Formiko kaj kosmo, Inteligenco laŭ Machiaveli, Josef Ŝvejk havas 30 milionoj da jaroj, Homo sapiens stupidus, Demenco... Li estas multfoje premiita je popularigo de scienco.

Ĉi tie vi povas legi tekston el kovrilo de la libro „Ribelo de deprivitoj...“, kie oni klarigas la nocion „deprivito“

Personojn, kiujn ni priskribas en la libro, oni difinas kiel deprivitoj. Ili en ordinara senco ne kondutas krime kaj povas esti potence kaj ekonomie tre plensukcesaj. Prizonitaj estas nur malofte. Tre ofte ili estas altlerneje klerigitaj. Oni trovas ilin inter politikistoj, sur pintaj lokoj de ŝtata administracio, en armeo, polico kaj justico, sur gravaj lokoj en korporacioj, inter kuracistoj, sciencistoj, inter homoj de artisma mondo, juristoj, psikologoj, en administracioj

de eklezioj, inter gazetaraj magnatoj kaj lobistoj – ĉie, kie temas pri povo kaj posedo.

Ili estas ankaŭ en postenoj malpli influaj, en ordinara vivo, en laborejoj, en am-, edz-, famili-, partner- sociaj ĉiutagaj rilatoj. Ili ne devas esti tro sukcesaj. Certe multaj legantoj renkontis ilin persone kaj multaj pro tiuj renkontiĝoj kruele pagis, eĉ ĝis fino de sia vivo.

Ni provos montri, ke kerno de ilia diverseco kaj detruigo estas en devio de iliaj emocioj kaj en socia vivo.

Bazaj signoj de ĉiuj aspektoj de la depriviteco estas detruigoj de emocioj kaj valorecoj, kaj paraziteco. Deprivito detruas infanon, alian homon, katedralon, same kiel sciencan bibliotekon, bildon, statuon, parton de parko, tomboŝtonojn je kia ajn preteksto. Kiel ununuran sencon la deprivitoj travivas kaj rekonas povon.

Tian homan grupon ni priskribis en la unua parto de la libro – *Monstroj* - . La dua parto de la libro estas – *Iloj kaj socia medio* – kaj montras manierojn, per kiuj la deprivitoj influas homajn grupojn. Precipe ni priskribas grupan stultecon, neracionalecon, propagandon, absurdecon kaj antisciencon en socia medio, kiu kunefikas ĉe evoluo kaj agado de la deprivitoj.

La lasta parto – *Defendo* – priskribas manierojn, kiuj povas malgrandigi verŝajnecon de estiĝo kaj minimumi influon de la deprivitoj.

La libro estas adresita al ĉiu homo, kiu interesiĝas pri malbono en socio. Ni klopodis verki ĝin tiel, ke estu legebla ankaŭ por mezlernejanoj – por larĝa publiko.

La libro enhavas interesajn fotojn de Lubomír Kotek, sed tiuj fotoj ne havas rektan rilaton al la enhavo de la libro.

Tiom da vortoj de aŭtoroj sur la koverto de la libro.

Sur paĝo 5 oni skribas: Ĉiuj rajtoj estas rezervitaj.

Tiu ĉi libro nek ia parto de ĝi rajtas esti reproduktota, nek tenata en reŝerŝsistemo nek transportota iel ajn (inkluzive de mekanika, elektronika, fotografa aŭ alia maniero) sen skriba jeso de la eldonejo.

Copyright © Galén, 2006

ISBN 80-7262-410-5

Post tiu ĉi informo mi ekkredis, ke deprivitoj jam aranĝis gardon pri si mem kontraŭ tiu ĉi libro, eble eĉ kontraŭ aŭtoroj...

Jindřiška Drahotová, Ĉeĥio  
mail: [drahotovaesperanto@seznam.cz](mailto:drahotovaesperanto@seznam.cz)  
www: [www: www.mlboleslav.cz/esperanto](http://www.mlboleslav.cz/esperanto)

**Mi petis permeson por traduko kaj mi ricevis afablan skriban konsenton por traduko eĉ publikigo de partojn el la libro en Esperanton de direktoro de eldonejo. Eble ŝajnas, ke Esperanton oni ne opinias danĝera.**

### **Vortoj de pedagogo**

Trijara infano petas, ke oni al ĝi unu fabelon multfoje relegu. La infano dum laŭta lego povas rigardi tekston en sufiĉe grandaj literoj en libro. Ĝi baldaŭ komencos montri en la teksto kaj mem „legas“. La infano tiel ekkapablas rilaton de sono kaj „bildo“ tute spontane.

Sed kiam oni anstataŭas legadon per videobendon, aŭ oni nur rakontas sen lego, la „natura legoscio“ restas por infano kaŝita.

### **Vortoj de Albert Einstein**

Homa estaĵo formas parton de la tutaĵo kiun oni nomas „Universo“, parton limigitan en tempo kaj spaco.

Homo spertas sin mem, siajn pensojn kaj spertojn kiel io apartigita de la cetero, ia optika trompo de sia propra konscio.

Tiu ĉi iluzio estas por ni karcero, limigante nin al niaj propraj deziroj kaj sopiroj kaj al la afekcio por kelkaj homoj, kiuj estas proksimaj al ni.

Devas esti nia tasko liberiĝi el tiu ĉi karcero, pligrandigante nian kampon de indulgo por ĉirkaŭbrakumi la homaron kaj la tutan naturon en ĝia beleco.

Pere de Movado sen Nomo  
[www.movado-sen-nomo.org](http://www.movado-sen-nomo.org).

Ĝis revido en Legolibreto V !

Vi povas sendi viajn artikolojn!

drahotova@esperanto.cz